

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





● Forstokulturo de la lastaj 10 jaroj en niaj okuloj

● Pri kio pensas la nunaj studentoj de Ĉinio

● En Francio post 40 jaroj

● Malpermesi kemiajn armilojn — komuna deziro de la homaro







INTER NI

Post la reformo de EPĈ...

● Mi ricevis la n-ron 1/1989 de El Popola Ĉinio kaj tre plaĉis al mi la reformo de la revuo.

H. GIL (HISPANIO)

● La revuo profunde rejuniĝis kaj la kvalito de la fotoj esence pliboniĝis.

J. KONDOR (FR GERMANIO)

● Mi devas laŭdi la plibonigitan revuon EPĈ. Ĝi estas nun ankoraŭ pli bela kaj ĉarma, per la plibonigitaj bildoj kaj pliigitaj koloraj bildoj. Eĉ miaj kolegoj rigardas ĉiam EPĈ. Ili estas neesperantistoj! Nur sur kelkajn paĝojn venis fuŝkonturaj fotoj. Certe ili estiĝis dum la presado. Sed mi estas certa, ke tiaj feblecoj malaperos pli kaj pli. Ankaŭ la loka dispartigo estas pli bona. Sur la "ENHAVO"-paĝo estas nun ne pli la loka malŝparo. Nun estas sur la sama paĝo la bona landkarto de Ĉinio, kie oni povas vidi nun tuj sen serĉi, kiuj lokoj estas menciitaj en la numero.

A. JACOBS (DR GERMANIO)

● Mi atente legis la unuan numeron de 1989. Tre interesis min la artikolo "Rompi Feran Bovlon" kiu bone klarigis al ni la problemojn pri senlaboruloj, la fotoj bone helpis la artikolon.

"Kurantaj Aferoj" tre plaĉas al mi, mi ofte tradukas partojn de ili al neesperantistoj kiuj miris pri miaj informoj!

J. HUET (FRANCIO)

● Ni gratulas vin pri la tre ŝika metamorfozo de via ŝatata gazeto. Emociite ni presigis je nia kosto en nia organo "La Movado" reklamon pri ĉijara EPĈ, kvankam ni ne scias, ĉu tiaj rekomendaj vortoj plaĉos al vi.

**Japana Esperanta
Librokooperativo**

ENHAVO

- 6 Forstokulturo de la lastaj 10 jaroj en niaj okuloj
- 54 VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO:
Ĉe Taihu-lago
- 45 Puyang, nova petrola urbo
- 20 En Francio post 40 jaroj
- 35 POR KOMENCANTOJ:
Gaja kateto
- 34 ESP-NOVAĴOJ
- 16 Kion pensas la nunaj studentoj de Ĉinio?
- 11 INTERVJUOJ:
"Magnato de fiŝoj" en antaŭurbo de Pekino
- 50 La drinkejo "Klubo" (Novelo)
- 28 ĈINA LITERATURO:
Prospero de zaĝju-opero en Yuan-dinastio kaj la granda dramisto Guan Hanqing
Maljusto al Dou E (Fragmento)
- 38 Dancoj de nacimalplimultoj en Yunnan
- 48 Terapio de aŭriklakupunktura pinĉado servas al malsanuloj
- 33 POR VIA SANO:
Korposanigaj metodoj (VII)
- 23 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (3):
Qionglai en suda Sichuan
- 43 Originala muzeo
- 59 LA IMPERIESTRĀ PALACO (3):
Taihemem-pordego kaj Taihemem-placo

- 18 Besta prezentado en la Pekina Zoo
- 14 Malpermesi kemiajn armilojn — komuna deziro de la homaro
- 36 KURANTAJ AFEROJ
- 41 Rezulto de la konkurso de EPC-amikoj
- 32 Solvoj por la konkurso de EPC-amikoj
- 4 INTERNI
- 33, 35 KORESPONDI DEZIRAS

SUR LA KOVRILO:

Hani-a knabino en bela kostumo

Foto de **LIU SIGONG**

INTERNE DE LA KOVRILO:

La Granda Muro

Foto de **YAN JIN**

La Granda Muro de Ĉinio estas konata kiel unu el la grandiozaj antikvaj konstruoj de la mondo. Ĝi komenciĝas de Jiayuguan (Ĝjajuguan)-pasejo en Gansu-provinco okcidente kaj finiĝas ĉe Shanhaiguan-pasejo en Hebei-provinco oriente, kun longo de 6700 km. La muro estis konstruita en Qin (Ĉin)-dinastio (221-206 a.K.) kaj la postaj dinastioj ĝin rekonstruis. Kaj la nuna Granda Muro estis kompletigita en Ming-dinastio (1368-1644).

4 Sur paŝtejo (Foto)

22 ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:

Vivo de evenkoj

SUR LA DORSKOVRILO:


[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Kato

de **TRUDE SINNO** (FR Germanio)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


- 1. Sichuan-provinco
- 2. Yuxian-gubernio
- 3. Leizhou-duoninsulo
- 4. Fujian-provinco
- 5. Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono
- 6. Puyang
- 7. Yunnan-provinco
- 8. Luoyang
- 9. Yangzhou
- 10. Yixian-gubernio




Forstokulturo de la lastaj 10 jaroj en niaj okuloj

Teksto de WANG YANQING kaj CHEN YONGQING*
Fotoj de ZHANG CONGMI

Forsto





Nordokcidenta kampoŝirma forsto

DUM miloj da jaroj la ŝanĝigon de la ĉinaj arbaroj ĉiam sekvas batalo inter saĝo kaj stulto. En la lastaj 10 jaroj la batalo estis senprecedence akra.

Antaŭ 8 jaroj, tuj post malofta inundo en Sichuan-provinco, la ĉina gvidanto Deng Xiaoping (Deng Ŝjaŭping) montris: "La lastfoja inundo koncernas forstokulturon. Ĝi kaŭziĝis de tro multa arbohakado." Laŭ lia propono, en decembro de tiu jaro la 4-a Sesio de la 5-a Tutlanda Popola Kongreso aprobis "Rezolucion pri Tutpopola Deviga Arboplantado". Poste, ĉirkaŭ la 12-a de marto ĉiujare, centoj da milionoj da homoj partoprenas en arboplantado. De la sudo ĝis la nordo, de la oriento ĝis la okcidento, deviga arboplantado jam fariĝis mor-

alo observata de la ĉinaj civitanoj. La gvidantoj de la centra kaj lokaj registaroj ĉiam estas aktivaj en arboplantado.

En la pasintaj 10 jaroj ĉinaj gvidantoj estis maltrankvilaj pro arbodetruo kaj sentis urĝan bezonon kulturigi arbojn. Jam en 1979 Hu Yaobang, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (CK KPC), skribis al la partia komitato de Yixian (Jiŝjan)-gubernio de Hebeiprovinco, ke oni devas kulturigi arbojn sur la dezertaj montoj, kulturigi komercajn arbarojn kaj fruktarbarojn kaj tion fari persiste. En 1983, kiam Hu Yaobang inspektis en nordokcidenta Ĉinio, li multe parolis pri kulturado de arboj kaj herboj.

Ankaŭ Zhao Ziyang (Ĝaŭ Zijang), la nuna ĝener-



Sciencistoj esploras fiinsektojn en arbaro.



Reformado de forstejo

ala sekretario de CK KPĈ, ĉiam atentis la disvolviĝon de la ĉina forstokulturo. Li opinias, ke forstokulturo havas decidan signifon por krei bonan medion por agrikulturo kaj teni ekologian ekvilibron. Malgraŭ sia okupiteco li skribis leteron al la Forstokultura Ministerio por disvastigi la forstokultur-an sperton de Yuxian(Juŝjan)-gubernio de Henan-provinco.

Ĝuste tiu spirito respondi por la posteuloj sekvigis serion da notindaj aferoj en la lastaj 10 jaroj en la ĉina forstokultura historio.

En 1979 Ĉinio komencis stabiligi rajtojn pri montoj kaj arbaroj, parceligi montojn por privata uzo kaj ellabori respondecan sistemon de forstokultura produktado kaj tiel faris gravan paŝon en la forstokultura reformado; en 1980 Ĉinio unuafoje difinis verdigon de la patrolando kiel gravan politikon de la ŝtato; en 1981 Ĉinio elmetis strategiajn taskojn de reguligo kaj disvolvo de forstokulturo; en 1984 la 7-a Sesio de la 6-a Tutlanda Popola Kongreso aprobis "Arbaran Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko"; post nelonge aperis "Leĝo pri Medi-protektado" kaj "Leĝo pri Herbejoj", kio montras, ke perfektigis la ĉina leĝa sistemo pri protektado de arbaroj.

Se oni diras, ke la forstokultura reformado en la lastaj 10 jaroj enkorpiĝas praktikadon de serio da gravaj politikoj kaj leĝoj, do alia grupo da elokventaj ciferoj povas bone montri la rezulton de la reformado.

Laŭ statistiko, en la lastaj 7 jaroj ĉiujare pli ol 200 milionoj da civitanoj plenumis sian devon. La verdigita areo en la ĉinaj urboj kreskis preskaŭ je duono. Oni plantis sume pli ol 7 miliardojn da arboj. Per tiom da arboj oni povas kovri Pekinon kaj Ŝanhajon. Samtempe oni plantis kaj rebonigis en la lando pli

ol 10 milionojn da hektaroj da herboj.

La alia rimarkinda atingo estas konstruado de forsto-zonoj en nordorienta, norda kaj nordokcidenta Ĉinio. Nun la unuaperioda konstruado jam finiĝis. Oni plantis sume pli ol 8.6 milionojn da hektaroj da arbaroj, kiuj protektis 80 milionojn da hektaroj da paŝtejoj kaj kampoj. Por la konstruado la ŝtato kaj diversaj lokoj investis 1.72 miliardojn da juanoj. Nun la duaperioda konstruado jam komenciĝis kaj daŭros ankaŭ 10 jarojn.

Konforme progresas ankaŭ la konstruado de kampoŝirmaj forsto-zonoj sur la sudorientaj marbordoj de Ĉinio. Ekz. Leizhou(Lejĝou)-duoninsulo de Guangdong-provinco antaŭe estis nuda kaj de la 7-a jc. estis ekzilejo, sed nun la kontraŭventaj forstoj etendiĝas milon da km. laŭ la marbordo kaj kovras preskaŭ trionon de la duoninsulo.

En centra kaj norda Ĉinio kaj sur la Nordorienta Ebenaĵo la kampoŝirmaj forsto-zonoj jam formiĝis. Nemalmultaj forstoj en nordorienta kaj sudokcidenta Ĉinio estis novigitaj. Ankaŭ en Fujian(Fuĝjan)-, Guangdong- k.a. 11 provincoj sude de Yangzi-rivero oni plantis grandnombrajn komercajn arbarojn kun te-oleaj arboj, tungoj kaj juglandarboj kiel la ĉefaj.

Retrorigardinte la pasintajn 10 jarojn, oni povas diri, ke en la ĉina historio neniam aperis tia grandioza forstumado. En tiu senco, en la lastaj 10 jaroj forstokulturo prezentis brilan perspektivon por la vivmedio de la ĉina nacio.

Tamen la menciita atingo estas nur ereto en la longa historio. Kaj plie, en tiuj 10 jaroj neniam ĉesis batalo inter dezerto kaj oazo, inter dezerta tero kaj arbaro, inter stulto kaj civilizacio.

Ekz. en la lastaj 10 jaroj la arbara areo de 131



12

forst-administracioj de la ŝtataj forst-regionoj reduktiĝis je 1/4, kaj ilia akumula kvanto de arbaroj malmultiĝis je 1/3. La aŭtonoma regiono Guangxi (Gŭangŝji) sola forhakis 250 000 hektarojn da arbaroj de 1981 ĝis 1985. En iuj lokoj ĉie oni vidas tro multan kaj senbridan hakadon. Tiuj hakantoj nur ĉasas monon, ne konsiderante la interesojn de posteuloj. Nun la areo de perdita tero en la supra baseno de Yangzi-rivero jam superis 350 000 kvadratajn kilometrojn. En iuj lokoj eĉ aperis ekologia krizo. Tiu kontraŭfluo serioze detruanta arbarojn estas akra

kontrasto kun la vigla kampanjo por la tutpopola deviga arboplantado.

En 1988 okazis en Guangxi eksterordinara superakvo, kiu inundis 40 guberniojn de la regiono kaj perdis havaĵon valorantan je miliardo da juanoj. Post la inundo oni ekkonsciis, ke la katastrofo rilatas rekte al la rapida reduktiĝo de forstoj en Gungxi. Iu maljunulo diris: "Antaŭ 50 jaroj pluvegis sur la monto, kaj pluvakvo fluis 8 horojn ĝis la montpiedo. Tiam la arbaro retenis multe da pluvakvo, tial la pluvego ne kaŭzis katastrofon."

En la lastaj 10 jaroj ĉiuj, kiuj plantis arbojn, semis esperon por sia nacio, kaj tiuj, kiuj senbride hakis arbojn, alportis al sia popolo senton de forstokultura krizo kaj unuafoje plifortigis la konscion de la tuta nacio pri arbora protektado.

Sur la tero iam estis 1.6 miliardoj da hektaroj da malsekaj tropikaj arbaroj, sed nun la nombro malpliĝas je miliono da hektaroj ĉiujare. Laŭ takso, en la jaro 2000 restos en la mondo nur 600 milionoj da malsekaj tropikaj arbaroj. Nemalmultaj sciencistoj antaŭdiris, ke la katastrofo kaŭzita de ekologia detruo estos la plej granda katastrofo por la homaro en la venonta jc. Ni esperas, ke nia ĉina nacio havos sufiĉan konon pri kaj sufiĉan kuraĝon por protekto de niaj arbaroj en la venontaj 10 jaroj kaj venonta jc. ■

* La aŭtoroj estas raportistoj de Radio Pekino.



Arboplantado



Primitiva arbaro



Flegado de juna forsto

Foto de GAO CHANGFU



INTERVJUOJ

“Magnato de Fiŝoj” en Antaŭurbo de Pekino

Teksto de
Fotoj de

ELIRINTE el la urbaj kvartaloj de Pekino, la aŭto rapide kuris al Nanwu-vilaĝo de Shunyi-gubernio, kien mi veturis en frosta vintro por intervjuo. La ŝoforo Yuan Baozhong (Jŭan Baŭgong) estis neniu alia ol la “magnato de fiŝoj” en la antaŭurbo de Pekino, kiun mi volis viziti. Kun kaskedo sur la kapo kaj cigaredo inter la lipoj, li manipulis la stirradon per siaj fortaj manoj. Li estis terkulturisto. Li, 40-jara, estas samaĝulo de la nova Ĉinio.

Mi estis tre ĝoja, ĉar estis la unua fojo por mi veturi per aŭto de kamparano. Yuan Baozhong havas limuzinon, kamionon kaj jipon. Kamparano havas aŭton, tio estas tute ordinara en la evoluintaj landoj, sed en Ĉinio ne. Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio centoj da milionoj da ekspluatataj kamparanoj baraktis en malsato kaj malvarmo. Tiam ili eĉ ne kuraĝis pensi pri aĉeto de aŭto, ĉar ili eĉ ne havis monon por biciklo. Eĉ antaŭ 10 jaroj, la aĉetpovo de kamparanoj estis tre malalta. Alkatentitaj al la kolektiva tero, ili vivis malriĉan vivon. Tamen, kiam ekblovis la printempa vento de la kampara reformo, la kamparanoj ekhavis novan vivon. Nun la problemo pri vestoj kaj manĝaĵoj estis solvita ĉe plejparto da la kamparanoj kaj parto de ili riĉiĝis. Yuan Baozhong, kiu riĉiĝis de la fiŝbreto, estas unu el la kamparanoj riĉiĝintaj en la lastaj jaroj.

Atinginte Nanwu-vilaĝon ĉe la piedo de Yanshan-



Transporti fiŝojn al Pekino



monto, nia aŭto, ĉirkaŭirinte la glaciigintajn fiŝcisternojn, eniris en la loĝejon de Yuan. Lia loĝejo konsistas el du kortoj kun 32 ĉambroj. En la ekstera korto la domoj kun vitra koridoro estas dekoraciitaj kiel eleganta vilao. Somere, liaj amikoj venas ĉi tien de urboj por fiŝhoki ĉe liaj fiŝcisternoj. La domoj ja estas konstruitaj por tiuj fiŝhokantoj.

La sekvantan tagon mi iris okcidenten de la vilaĝo por viziti liajn cisternojn. Li havas 60 fiŝcisternojn oriente kaj okcidente de la vilaĝo, kiuj grandparte troviĝas okcidente. Tie murmuras klara rivero, fontanta el la malproksima Yanshan-monto kaj fluanta suden. Ĝia bonkvalita akvo estas taŭga por bredi fiŝojn. Bedaŭrinde la bonkvalita akvo vane fluis multajn jarojn kaj neniu ĝin utiligis por bredi fiŝojn. En la lastaj jaroj fondiĝis en la vilaĝo kolektiva farmejo. Familioj spertaj en terkulturo kaj administrado laŭ kontrakto prenis la tutan agron de la vilaĝo kaj respondecas pri la grena produktado, kio finis la historion, ke ĉiuj vilaĝanoj sin okupis pri terkulturado. Dank' al tio pli ol 70% de kamparaj laborfortoj elliberiĝis el la terkulturado povas sin okupi pri aliaj aferoj, kiaj ekspluato de fruktoĝardenoj, funkciigo de entreprenoj, bestobredado, transporto, domkonstruo kaj komercado. Liberigita el terkulturado, Yuan tuj interesiĝis pri fiŝbredado. En du jaroj per pruntita mono li fosis cisternojn oriente kaj okcidente de la vilaĝo. Tiuj okcidente de la vilaĝo ĉe la riverbordo etendiĝas 4 km. Sub lia gvido,

oni transformis en fiŝcisternojn ĉiujn marĉojn kaj fragmitejojn ĉe la rivero kaj establis la senprecedence grandan karieron de fiŝbredado ĉe la piedo de Yanshan-monto. Li dungis 20 personojn por bredi fiŝojn kaj produktas jare 200 mil kg. da karpoj, karasoj kaj famaj Wuchang-fiŝoj. Li estas elstara persono el la specialigitaj familioj pri fiŝbredado en la antaŭurbo de Pekino, sekve de tio li estas honorita kiel "magnato de fiŝoj". Krom fiŝbredado li laŭkontrakte administras du farmejojn, kie li bredas porkojn, bovojn kaj kokojn kaj kulturadas legomojn, fruktarbojn kaj grenojn. 15 unitoj financas liajn entreprenojn kaj regule aĉetas de li kokojn, fiŝojn, ovojn kaj viandon. Tial li ne bezonas maltrankviliĝi pri vendo de la produktaĵoj, dume ankaŭ la financantaj unitoj estas favorataj.

Mi forte deziris fari longan interparolon kun li, kio tamen realiĝis malfacile, kvankam mi loĝis ĉe li. Ĉiumatene, antaŭ mia ellitiĝo, aŭdiĝis motorbruo el la obskura korto. Oni sciis, ke Yuan ekveturas al la urbo. Nokte, kiam hurlis malvarma vento kaj oni profunde dormis, li revenis hejmen. Kiom malfrue li revenis, li certe interparolis kun mi en mia ĉambro. Lia vizaĝo roziĝis de malvarmo. Liaj manoj pleniĝis de fendetoj. Mi longe rigardis lin kaj nevole ekpensis, kiel peniga estas la entreprenado. Post kelkaj tagoj li fine trovis liberan tempon por interparoli kun mi, sidante ĉirkaŭ la forno.

Li konigis al mi sian infanecon: Lia patrino estis malsana. Li estis tiel malriĉa ke li ne havis monon por aĉeti skribilon kaj paperon. Iun vintran tagon, survoje al la lernejo, iu knabo provokis: “Ĉu vi aŭdacas demeti vian veston kaj nuda iri al la lernejo? Se jes, mi donos al vi 10 fen-ojn.” (unu juano egalas 100 fen-ojn) Li pensis, ke per 10 fen-oj oni povas aĉeti unu kajeron kaj unu krajonon. La provoko estis alloga por Yuan, malriĉa kaj sciavida knabo. Li do grincigis siajn dentojn, demetis sian veston kaj iris 2 km. en la frosta vento. Tiel malriĉa, li devigite forlasis la lernejan vivon en infanaĝo. Poste, li eklaboris kiel ŝarĝisto en urbo. Por ke la malsana patrino estu kuracata, li ŝparis ĉiun groŝon. Li ne aĉetis mantoon, sed manĝis maizon. En la tumultaj 70-aj jaroj, li revenis hejmen kaj daŭre vivis la malriĉan vivon. Kiam li edziĝis, li havis nur kelkajn manĝbastonetojn, bovlojn kaj la domaĉon.

La reformado portis al li fortunon kaj ŝanĝis lin, la unuan malriĉulon de la vilaĝo, en la plej riĉan. Riĉiĝinte, li ne forgesis, kiel lin helpis la samvilaĝanoj kaj la registaro. Kiam li planis fosi fiŝujon, iu urba kompanio promesis investi al li 300 mil juanojn. Sed tute ekster la atendo, kiam la fosado finiĝis, la kompanio donis nenion. La embarasita Yuan ja devis pagi 180 mil juanojn al la fosantoj. Kion fari? Liaj samvilaĝanoj pruntedonis al li la monon. Tion sekvis alia malfacilo — li ne havis monon por aĉeti fiŝnutraĵon. Miloj da fiŝoj surakviĝis por serĉi manĝaĵojn. Tiam, estis ankaŭ liaj samvilaĝanoj, kiuj pruntedonis al li 50 tunojn da maizo por ke li nutru la fiŝojn.

“Ĉu vi havis ian malsukceson?” mi demandis lin. Li respondis, ke la plej grandaj malsukcesoj estis la morto kaj forkuro de fiŝoj. En iu somera mateno, li trovis, ke 10 tunoj da fiŝoj surakviĝis kaj mortis. La fiŝbredistoj kun larmoj diris: “Ni vane klopodis la tutan jaron.” Yuan ja ne larmis. Li bone sciis, ke mortis la fiŝoj en granda nombro pro manko de oksigeno, ĉar mankis al li kapitalo kaj li ne instalis oksigendonan aparaton al la fiŝcisterno. Poste, li kolektis monon kaj aĉetis la aparaton. Sed ho ve, en la sekvanta jaro 3 fiŝcisternoj breĉiĝis pro pluvego kaj 20 mil kg. da fiŝoj forkuris. Antaŭ la gravaj perdoj Yuan forte ĉagreniĝis, sed ne malesperis. Ju pli da malsukcesoj estis, des pli kuraĝa li fariĝis. Hodiaŭ, abundaj fiŝoj naĝas en la cisterno oriente kaj okcidente de la vilaĝo.

Yuan estas helpema. Li laŭeble plenumas ĉian peton de la samvilaĝanoj. Li pruntedonis 60 mil juanojn al 10 familioj por ilin helpi en la liberigo de malriĉeco. En la somera rikolto, li kondukis sian ŝarĝaŭton sur tritikan kampon por helpi ilian transporton. Per 5000 juanoj, li helpis vilaĝanojn en domkonstruo. Li elspezis monon por konstrui la vilaĝajn oficejon kaj maljunulejon. Laŭ sia nuna ekonomia stato, Yuan povas vivi luksan vivon, sed li tion ne faras. Li dediĉis siajn energiojn al la kariero: Li faras ĉion eblan por altigi la administran nivelon kun celo pli bone bredi fiŝojn kaj pli bone funkciigi la farmejojn, dume li planis ekspluati lokajn riĉfontojn, produkti mineralan akvon, konstrui prilaborejon kaj arbaran sanatorion. ■



Yuan subskribas kontrakton pri vendo de siaj produktajoj.

Malpermesi Kemiajn Armilojn — Komuna Deziro de la Homaro

LA Internacia Konferenco pri Malpermeso de Kemiaj Armiloj okazis en la halo de Unesko en Parizo, la 7-11-an de januaro 1989. Ĝin ĉeestis reprezentantoj el 149 landoj kaj regionoj. Ili kolektiĝis por serĉi vojon malpermesi kemiajn armilojn, diskuti pri projekto kaj plifortigo de la valideco de la "Ĝeneva Interkonsento pri Malpermeso de Gaso, Similaj Venenaĵoj aŭ Bakterioj en Milito" (alinome "Ĝeneva Interkonsento"), kaj klopodi por kiel eble plej frue subskribi internacian konvencion pri malpermeso de kemiaj armiloj per la ĝeneva intertrakto pri malarmado.

La "Ĝeneva Interkonsento" estis subskribita de 38 landoj en Ĝenevo en junio 1925. Ĝi difinis, ke estas malpermesite uzi en milito ĉiujn asfiksiajn gasojn, similajn venenaĵojn kaj venenajn instrumentojn. Laŭ la difino, estas malpermesite uzi ankaŭ bakteriajn armilojn en milito. La interkonsento ekvalidis la 8-an de februaro 1928. Jam en aŭgusto 1929 Ĉinio partoprenis en la "Ĝeneva Interkonsento". Post sia fondiĝo la Ĉina Popola Respubliko agnoskis ĝin julie de 1952. Ĝis nun 110 landoj partoprenis en ĝi.

Kiel nukleaj armiloj, la kemiaj armiloj serioze minacas la sekurecon de la homaro kaj mondpacon. Ĝiaj provfarado, produktado kaj uzado jam vekis grandan maltrankvilon en la internacia socio,

tial nepre necesis okazigi tian konferencon. Multaj landoj partoprenis ĝin, tio plene montris, ke la internacia socio multe atentis pri la serioza minaco de kemiaj armiloj kaj forte deziras komplete malpermesi tiajn armilojn.


De la lastaj du jaroj la monda situacio transiras de kontraŭstaro al interparolo, de streĉiĝo al malstreĉiĝo. Tamen, malstreĉiĝo ne signifas neeston de konfliktoj kaj la ĉefaj faktoroj kaŭzantaj maltrankvilon al la mondo ankoraŭ ne estas eliminitaj. Tial, kun persistado en la nuklea kaj konvencia malarmado, estas pli urĝe kaj pli necese malpermesi kemiajn armilojn, ĉar ili havas teruran detruan povon kaj vundadon. En la pasinta duoncentjaro ili rabis la vivon de milionoj da homoj. Cetere, la kosto kaj tekniko por produkti kemiajn armilojn ne estas altaj, iliaj krudmaterialoj estas senpene akireblaj, tial facilas grandkvante produkti ilin. Nun, nemalmultaj landoj posedas kondiĉojn kaj teknikojn por produkti kemiajn armilojn, dekoj da landoj posedas aŭ eble posedas tiajn armilojn, kun totala rezervo de 400 000-500 000 tunoj, inkluzive de iverito, ciano, nervodifekta gaso k.a. Estas pli danĝere, ke kun la disvolvigo de scienco kaj tekniko, baldaŭ aperos novaj kemiaj armiloj, kiaj supervenenaj toksoj kaj toksinoj.

En la konferenco reprezentantoj

de diversaj landoj plene esprimis sian fortan deziron kiel eble plej rapide malpermesi kemiajn armilojn.

En sia inaŭgura parolado prezidento de Francio s-ro Francois Mitterrand forte riproĉis la krimon uzi kemiajn armilojn kaj alvokis, ke ĉiuj landoj deklaru ne plu uzi kemiajn armilojn.

S-ro Qian Qichen (Ĉjan Ĉjiĉen), estro de la ĉina delegacio kaj ministro de eksteraj aferoj de Ĉinio, alvokis en la konferenco kiel eble plej frue subskribi internacian konvencion pri komplete malpermeso de kemiaj armiloj. Li prezentis kvar paŝojn: Firme protekti la validecon de la "Ĝeneva Interkonsento"; alvoki, ke land-membroj de la ĝeneva intertrakto pri malarmado rapidigu la intertrakton, kiel eble plej frue subskribu internacian konvencion pri malpermeso provfari, produkti, akiri, konservi, rezervi kaj uzi kemiajn armilojn; la landoj, havantaj plej grandan stokon da kemiaj armiloj, la unuaj donu garantion, ke ili tuj ĉesu provfari, produkti kaj liveri kemiajn armilojn, absolute ne uzos kaj detruos ilin en tempo laŭeble mallonga; kaj ĉiuj landoj kapablaj provfari kaj produkti kemiajn armilojn ĉesu produkti tiajn armilojn. La starpunkto de la ĉina ministro por ĉiufanka malarmado kaj komplete malpermeso de kemiaj armiloj estis varme laŭdata de la



La kunvenejo de la Internacia Konferenco pri Malpermeso de Kemiaj Armiloj

ĉeestantoj.

Ministro de eksteraj aferoj de Sovetunio s-ro Eduard Shevardnadze deklaris en la konferenco, ke antaŭ ol subskribi novan internacian konvencion pri malpermeso de kemiaj armiloj, Sovetunio komencos detruiri stokatajn kemiajn armilojn en la kuranta jaro, kaj esprimis sian aprobon, ke oni faros ĉelokan inspekton kaj ekstreme rigoran kontrolon al koncernaj kemifabrikoj. La ŝtata sekretario de Usono s-ro George P. Shultz emfazis, ke oni devas malebligi liveri aŭ vendi kemiajn armilojn, kaj postulis, ke estu malpermesite eksporti teknikon pri produktado de kemiaj armiloj.

Reprezentantoj de landoj de la tria mondo, kiaj Egiptio, Tunizio, Alĝerio, Sirio, Brazilo kaj Niĝerio, montris, ke la okcidentaj industriaj landoj ne nur liveras aŭ vendas kemiajn armilojn en la tria mondo, sed ankaŭ daŭre modernigas siajn kemiajn armilojn, tial ili devas la unuaj ekagi por malpermesi kemiajn armilojn. La reprezentantoj forte postulis, ke la nuklea malarmado estu farata samtempe kun malpermeso de kemiaj armiloj.

Estas peniga tasko komplete

malpermesi kemiajn armilojn.

Nun ankoraŭ ekzistas konfliktoj inter regionoj kaj de tempo al tempo okazas uzado de kemiaj armiloj. Por vere komplete malpermesi kemiajn armilojn, ĉiuj landoj devas tuj ekagi, alpreni efikajn paŝojn, kiel eble plej frue subskribi internacian konvencion pri komplete malpermeso de kemiaj armiloj kaj strikte observi ĝin. En tiu ĉi konferenco la reprezentantoj de ĉiuj landoj senescepte aprobis malpermeson de kemiaj armiloj, tio estas bazo por efektiviĝi kompletan malpermeson de kemiaj armiloj. Tamen, estas ne malmultaj malfaciloj por vere atingi la in-

terkonsenton. La intertraktado pri malpermeso de kemiaj armiloj farita de la ĝeneva konferenco pri malarmado jam daŭris 17 jarojn. Dank' al la komuna penado de diversaj flankoj, ĝi atingis ian sukceson en iuj problemoj, tamen ankoraŭ ekzistas malakordoj en aliaj problemoj, kiel kontrolado.

Observantoj opinias, ke la pariza konferenco pri malpermeso de kemiaj armiloj konformas al la komuna deziro de la diverslandaj popoloj, tamen ĝi ja estas nur forumo kaj ne povas radikale solvi problemojn. Por komplete malpermesi kemiajn armilojn la internacia socio devas daŭrigi sian senlaca batalon.

* La aŭtoro estas raportisto de la Xinhua-a Novaj-agentejo en Parizo.

ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugalio	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
USD	10.00	17.00	24.00

Po raliaj landoj en Azio, Afriko kaj

Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
USD	6.50	11.00	16.00

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Pri Kio Pensas la Nunaj Studentoj de Ĉinio?

SENDUBE la nunaj studentoj de Ĉinio estas la plej sentema kaj vigla parto de la ĉina junularo. Antaŭ nelonge la Ĉina Scienc-teknika Universitato faris specimenan enketon al dek mil ĉinaj studentoj pri iliaj vidpunktoj pri vivo, socio k.a. La enketo montras ilian komplikan psikon.

ŜANĜIĜO DE KONCEPTO PRI PROFESI-ELEKTO

Laŭ enketo 64.98% de la studentoj opinias, ke la kriterio de profesi-elekto devas “ebligi disvolviĝon de faka talento kaj karieran sukceson”. Ili tre zorgas pri tio, ĉu dunganta entrepreno serioze trejnas dungitojn kaj metas ilin sur gravan postenon kaj ĉu ili povas disvolvi sian talenton. Ili tamen ne tiom multe konsideras malfavorajn laborkondiĉojn kiel antaŭe.

Iu diplomita esplor-studento de Ŝanhajo ne kontentis pri sia okupo donita laŭ tradicia sistemo, kaj tuj ricevinte profesion, li prezentis oficrezignan petskribon al sia estro por fariĝi privata komercisto. Tio sensaciis la lernejon kaj socion, ĉar tian aferon oni neniam aŭdis.

Post nelonge, aro da diplomitaj studentoj iris al la socio por mem elekti profesion. Kaj centoj da lernantaj studentoj sin anoncis por fari enketon aŭ labori sur Hainan-insulo, en foraj landlimaj regionoj kaj bazaj organizoj. Tio refoje skuis la socion.

Se vi vicigas la varmpunktojn zorgatajn de la nunaj studentoj, vi trovos tian interesan fenomenon:

escepte de “varmo de okcidenta kulturo”, “varmo de iro al speciala ekonomia distrikto”, “varmo de esploro en landlimaj regionoj” kaj “varmo de serĉo de okupo” plejparte strikte ligiĝas kun ilia strebo al memvaloro.

Oni povas trovi ŝanĝigon en profesi-elekto de studentoj, leginte la enketilojn de labor-serĉo plenigitajn de centoj da studentoj de la Ĉina Tekstila Universitato, Jiaotong(Ĝjaŭtong)-universitato kaj Fudan-universitato.

“Donu al ni ŝancon labori sur Hainan-insulo, malgraŭ tio, ĉu ni sukcesos aŭ ne.” Jam burĝonis konceptoj de konkuro kaj aventuro inter la studentoj de Fudan- kaj Tongji(Tongĝji)-universitatoj. Fudan-universitato faris enketon al siaj mil studentoj. 82% de ili opinias, ke konkuro estas necesa kaj racia en la nuna socio. Tia koncepto estas estigita de la reformo kaj liberiginta el la tradicia, kiu karakteriziĝas per malaventuro kaj nenifarado.

“En elekto de profesio oni devas sin liberigi de psiko sekvi ĝeneralan tendencon”, jen vidpunkto de Zou Liangwu, studento de la filozofia fakultato de Fudan-universitato. Lia amiko post diplomigo el universitato ne volis ricevi okupon donitan de la ŝtato kaj mem ekfunkciigis kulturalan kafejon, kiu allogas multajn intelektulojn kaj junajn sciavidajn senlaburojn. Li profitas pli kaj pli multe. Preninte sian amikon kiel ekzemplon, Zou konkludis, ke dum sia profesi-elekto diplomitaj studentoj


devas ne blinde sekvi ĝeneralan tendencon, sed strebi per sia klopodo kaj sukceso por akiri agnoskon de la socio kaj per si mem efektiviĝi memvaloron.

Multaj studentoj pensas: “Neprefekta eduka sistemo estigis nin, ke ni blinde perfektigas nin, ne bone sciante la bezonon de la socio.” Sekve ili eliras el sia lernejo kaj serĉas kampon de sia afero en fabriko, minejo, urbeto, lernejo k.a. Ili iras al landlimaj regionoj kaj la okcidenta altebenaĵo de Ĉinio, kie mankas intelektuloj.


En sia profesia elekto sufiĉe granda parto de la studentoj zorgas pri vivkondiĉoj. Nemalmultaj studentoj de la Ĉina Tekstila Universitato en sia enketilo pri labordeziro en Hainan malkaŝe demandas: “Kian pozicion kaj salajron havas studentoj en la konstruado de Hainan?” Iuj eĉ metas la demandon en la lokon de la plej zorgataj problemoj.

VIDPUNKTOJ PRI VALORO DE VIVO

Studentoj laborantaj en la studenta kafejo Kangni en la urbo Hefei foje diskutis pri la vivvaloro de la nunaj studentoj. Iu altastatura junulo diris: “Mi aprobas la aserton ‘mi por ĉiuj kaj ĉiuj por mi’.” Li daŭrigis: “En sia laboro individuo faras kontribuon al la socio en formo de ‘mi por ĉiuj’; kaj la respekto kaj kontentigo de individuo fare de la socio estas manifestiĝo de ‘ĉiuj por mi’”. Li estas duaklasa studento de la administra



Adiaŭo de diplomitaj studentoj



Studentoj de la Anhui-a Universitato enketas en kamparo.

fakultato de la Ĉina Scienc-teknika Universitato. Li opinias, ke efektiviĝo de vivvaloro estas nedisigebla de individua penado, nek de objektivaj kondiĉoj kreitaj de aliaj.

Li fervore servas en la kafejo. Li fiere diris: “Dum mia servado al klientoj mi sentas min bezonata de la socio. Jen la efektiviĝo de memvaloro.”

La specimena enketo montras, ke 50.31% de la studentoj staras por “mi por ĉiuj kaj ĉiuj por mi”; 15.83% por “malegoismo kaj sindediĉo” kaj nur tre malmultaj por “homoj estas egoismaj estaĵoj, alie ne ekzistas la mondo.”

Studentino de la dua klaso de la jura fakultato de la Anhui-a Universitato diris: “Mi pensas, ke estas sensignife pasigi la vivon glate, kaj ŝajnas al mi, ke pli valora estas zigzaga vojo de la vivo.”

Studentoj de Hefei servas dufoje ĉiusemajne po kvar horoj en kafejo post la lecionoj. Ili diris, ke ili laboras por gajni monon kaj krome por koni la socion.

Ili diris ankaŭ: “Kompare kun la patra generacio, kiu pensas nur sindediĉon al la socio, ni, nunaj studentoj, estas iom “egoismaj” en ies okuloj kaj ĉiam volas manifesti kontribuon en realigo de memvaloro.” Tio estas penso denove pri neniigo de individuaj rajtoj en la pasinteco.

Iu profesoro opinias, ke la nunaj studentoj pli malkaŝe parolas pri

materiaj interesoj ol la patra generacio, kaj ke ili ekzamenas vivvaloron laŭ la vidpunkto de individua bezono kaj kunigas tiajn interesojn kun la kontribuo al la ŝtato kaj socio. Tio estas signo de socia progreso en la disvolviĝo de komerca ekonomio.

AMO ENTRUDIĜINTA EN ALTLERNEJOJN

Am-afero de studentoj ĉiam estas problemo sentiva por la ĉinaj studentoj. Nun ĝi jam fariĝis temo varme diskutata de studentoj. La specimena enketo montras, ke 70.51% de la studentoj opinias, ke oni ne devas intence ĉasi amon, sed lasi ĝin iri nature. 11.73% aprobas malfruan amon, por ke ĝi ne malhelpu lernadon.

En la pasinteco multaj altlernejoj malpermesis la am-aferon de siaj studentoj kaj enskribis tion en ilian disciplinan regularon. Tiam la am-afero iris “subtere”. Nun tute ŝanĝiĝis la stato. Rilate al la am-afero de studentoj, multaj altlernejoj jam ŝanĝis sian sintenon. Iuj fariĝis silentaj pri ĝi. Estroj kaj instruistoj de iuj altlernejoj opinias, ke oni ne devas subpremi aŭ malhelpi la am-aferon de studentoj, sed gvidi ilin sur ĝustan vojon de amo.

En Zhongshan (Ĝongŝan)-universitato de Kantono, sabate, kiam vespera krepusko falas, ĉie vidiĝas paro kaj paro da geamantoj sur zigzaga pado kaj gazono kaj

sub arboj. Iuj paroj pasigas sabatan vesperon en movoplena kvar-talo de la urbo.

Tiaj aferoj jam ne estas maloftaj en altlernejoj. Estas iu klaso de altlernejo en Pekino, kiu nombras 35 studentojn. El ili 28 havas amaton aŭ amatinon. El la studentoj de iu altlernejo 50% havas am-aferon. Nun la am-afero de studentoj disvolviĝas de alta klaso al malalta, kaj la nombro kreskas. Studento deziras amatinon mildan, saĝan kaj belan. Kaj studentino volas amaton zorgeman, karieraman kaj saĝan.

En elekto de profesio kongruas la vidpunktoj de gestudentoj. Plejparto de ili opinias, ke la plej ideala profesio de lia (aŭ ŝia) amat(in)o estas: kuracisto (aŭ flegistino), instruisto de altlernejo, sciencisto, administranto aŭ teknikisto de kompanio aŭ entrepreno.

Multe ŝanĝiĝis la koncepto pri seksa moralo de la nunaj studentoj. Multiĝas gestudentoj, kiuj ĝuas seksan vivon antaŭ geedziĝo. Oni demandis iujn studentojn pri iliaj vidpunktoj pri tia fenomeno.

Iu studento diris: “Oni ne devas riproĉi, se nur ili sincere amas unu la alian.” Alia studento ne konsentis: “Ili estas frivolaĵoj kaj certe ne ricevos feliĉon.”

51.62% de la enketitaj studentoj opinias, ke seksa vivo antaŭ geedziĝo estas “fenomeno de malvirto” kaj “nematureco de geamantoj”. ■

Besta prezentado en la Pekina Zoo

Teksto de LI QIANG
Fotoj de SHEN CHEN



PREZENTADO de dresitaj bestoj en la Pekina Zoo ofte allogas multajn turistojn en- kaj eksterlandajn kaj estas tre ŝatata de infanoj.


La aktoroj de dresitaj bestoj estas ĉimpanzo, granda pando, sim-

io, birdeto kaj tajlandaj batalemaj kokoj.

Birdeto forflugis de mano de aktorino, enflugis en malgrandan pagodon, trovis tie unu moneron kaj, bekpreninte ĝin, reflugis sur la manon de la aktorino. Tuj poste,

laŭ difinita direkto ĝi flugis al malgranda kesto, beke malŝosis ĝin, levis ĝin kovrilon, bekprenis objekton en la kesto kaj reflugis. La birdeto rapide plenumis la programerojn. Por ekspluati la kapablon de la birdo, la maljuna dresisto Zhao ĉiam kunportas ĝin kaj instruas al ĝi diversajn prezentadojn per manĝaj-premio.

Pando ludas pilkon per piedoj.



Feifei estas 2-jara ĉimpanzo. Ĝi povas fari multajn prezentaĵojn kaj tial fariĝis ĉefa aktoro de la besta prezenta grupo. La mastro de Feifei estas dresisto Malgranda Wu kun aĝo de ĉ. 30 jaroj. Diplomiĝinte el lernejo, li venis al la zoo kaj bredis ĉimpanzojn. Li ekamis ĉimpanzojn, instruis al ili balai, lavi al si la vizaĝon kaj imiti simplajn movojn de homo. Kiam Feifei estis unu-jara, ĝi timis homon kaj ne volis, ke Malgranda Wu proksimiĝu al ĝi. Ĝi eĉ gratis kaj mordis lin. Sed Malgranda Wu ĝin traktis pacience kaj amike. Tage li donis al ĝi manĝaĵojn trifoje kaj nokte unufoje kaj ĉiam bone prizorgis ĝin. Li amis Feifei kiel sian infanon. Iom post iom Feifei ekŝatis lin kaj ne plu volis disiĝi de li.

Sub la zorgemaj bredado kaj

dresado de Malgranda Wu, Feifei povas vektoporiti sitelojn, uzi ombrelon kaj teni sin sur unu piedo. Estas plej interesa la korbopilka konkurso kune prezentata de Feifei kaj Malgranda Wu. La konkursejo ne estas granda nek konkursaj reguloj aplikataj. Komence, Malgranda Wu faris kelkajn paŝojn frapante pilkon, kaj Feifei jam alkuris kaj alkroĉigis al li por forpreni la pilkon. Fine ĝi sukcesis kaj jetis la pilkon en korbon. Kompreneble, venkinto ĉiam estas Feifei.

Feifei estas lerta en aritmetika operacio. La ekzamenaj demandoj estas tiuj adiciaj aŭ subtrahaj kun

nombroj malpli grandaj ol 10, donitaj de infanoj. Tuj post kiam la demando estas donita, Feifei iras antaŭ la nombrotabulon, sin turnas kaj levas manon. Ĝiaj klaŭnaĵoj multe ridigas la infanojn. Malgranda Wu iom kritikas ĝin kaj postulas, ke ĝi atente faru la operacion, tiam Feifei deprenas nombron de la nombrotabulo. Ha, prave! Feifei gajnas aplaŭdodon de la infanoj. Kaj ĝi montras sin memkontenta.

Du batalemaj kokoj de Tajlando kun maldensa plumaro faras akran lukton sur ronda tablo. Ili saltas alte kaj akre bekbatas unu la

alian. La batalo finiĝas nur kiam unu el ili falas de sur la tablo. Estas interese, ke ili denaske estas batalemaj kaj ne konfesas sian malvenkon. Eĉ falinte de sur la tablo, ili ankoraŭ saltas kaj bekbatas ĝis kiam ilin disigas juĝanto.

Saĝa simio ludas klaŭnon. Ĝi jen vendas cigaredojn, puŝante ĉareton, jen prezentas rulsketadon. Ĝia prezentado estas lerta kaj komika kaj estigas senĉesan aplaŭdon de la spektantoj.

La 2-jara granda pando Lele estas stelulo el la bestaj aktoroj. Ĝi prezentas klarionadon, sidante en ĉareto, ludon de granda pilko per piedoj, kuŝante sur tablo, manĝadon de eŭropaj pladoj kaj telefonadon. Lele estas aminda kaj ĝia stultaĵo ridigas la spektantojn. La granda pando estas mallerta. Ĝi povas plenumi nur iujn mekanikajn movojn. Ĉar ĝi estas protektata rara besto, en la dresado oni ne povas ĝin bati kaj malsatigi. Tio malfaciligas la dresadon. Por akiri ŝaton de Lele, dresisto Malgranda Li bone prizorgas ĝin kaj pacience instruas al ĝi fari movojn. Por unu movo li ofte devas instrui cent kaj eĉ mil fojojn. Nur post tio Lele povas ĝuste plenumi la movon laŭ lia ordono. Tamen ĉiufoje, antaŭ ol Lele prezentas, Malgranda Li timas, ke ĝi forgesos la movojn kaj malsukcesigos la prezentadon.


Krome, ankaŭ hundeto, kapreto kaj papago faras brilan prezentadon. Post rigardo de la speciala prezentado de la besta prezenta grupo, oni povas apreci prezentadon de aziaj elefantoj en la elefanta domo. Elefanto Zanlan povas svingi sonorileton, frapi tamburon, ludi buŝharmonikon kaj alglui lipharojn al homfiguro pentrita sur tabulo. Alia elefanto Alaliya estas pli kapabla. Ĝi povas jeti korbopilkon en korbon, ludi piedpilkon, fari fiŝokadon, puŝi infanĉareton kaj danci, batante ritman takton laŭ muziko. Ilia brila prezentado ofte vekas ridegon ĉe la spektantoj. ■



Prezentado de ĉimpanzo

Foto de LI QIANG

Kokobatalo



En Francio post 40 jaroj

de LUDOVIKO ENIZAN

S-ro Ludoviko Enizan, aktivulo de Esperanto-movado en Rueil-Malmaison, Francio, membro de SAT kaj malnova amiko de EPĈ, kulturis aron da junaj esperantistoj, ĉiujare okazigas tie Esperantajn ekspoziciojn kaj tiel multe dediĉis sin por disvastigi Esperanton. Kun sia edzino Zorka Enizan li dufoje vizitis Ĉinion kaj en julio/1986, invitate de la Sciencista Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, venis al Pekino por esti instruistoj en Esp-kurso. Li ĉiam subtenas la ĉinan E-movadon, havas multajn korespondantojn inter la ĉinaj esperantistoj kaj multfoje varbis abonantojn por EPĈ. Pro tio ni esprimas al li kaj lia edzino profundan estimon.

La Red.

Post la Unua Mondmilito la franca radio elsendis ĉiutage en Esperanto kvin minutojn. Tiam mi eklernis la lingvon kaj tiele mi iom ekzercis mian komprenkapablon, sola, en mia vilaĝa izolejo. Sed kolapsis tiu elsendo kaj nenio plu aŭ-

diĝis regule. Preskaŭ kompleta silento. En nia lando enkonduki Esperanton en la informilojn: gazetojn, radiojn kaj televidojn, estas tre delikata afero.

Kio do okazis en 1988? Kia vento forblovis la esperantoparfu-

mon ĝis la redakcioj de niaj tutnaciaj stacioj? Ĉu iu sufiĉe lerte flustris la belsonan nomon "Esperanto" en senteman gazetistan orelon? Ĉu iu potenculo flaris la odoron de orminejo ekspluatebla? Mi tute ne scias, sed jen:

Gesinjoroj Ludoviko Enizan kaj Zorka Enizan



La 14-an de februaro, en la ĉefa kulturcentro de Parizo, estis prelego de s-ro Jan Otto De Kat pri la temo "Taŭgeco de la Internacia Lingvo Esperanto por la Maŝintradukado". Radio-jurnalistino ĉeestis.

La sekvantan tagon, la sama jurnalistino vizitis min kaj mian edzinon en nia hejmo, pridemandis nin kaj lernantinojn kaj registris la intervjuon.

La 16-an la tutnacia televido telefone invitis min al siaj studioj por kelkminutaj apero kaj intervjuo rekte sur la ekrano. La elsendo okazis la 18-an je la 16-a horo.

La 15-an de marto la sama tutnacia televido intervjuis nin en la SAT-sidejo en Parizo kaj filmis.

La 16-an kvar teknikistoj kaj unu ĵurnalisto de la skipo filmis kaj pridemandis niajn junajn gelnantojn en nia propra hejmo en Rueil-Malmaison. Mi proponis, ke la filmado okazu publike sur la strato "Zamenhof", bedaŭrinde la vetero estis pluva kaj frosta.

La 1-an de junio la ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro s-ro Henriko Masson, la juna anglo Riŝardo Comerford kaj mi kunvenis en la studioj de la nacia radio "France-Inter" kun ties redaktorino Brigitte (Briĵit) Vincent por unuhora intervjuo en rekta elsendado. Tre lertaj demandoj de Briĵita kaj tre spertaj respondoj de Henriko, la ĉefrolanto, kondukis la intervjuon al tre granda sukceso.

La 3-an de aŭgusto komenciĝis la E-kursoj je la iniciativo de Brigitte Vincent, kiu sin pretigis kiel lernantinon de Riŝardo. La kursoj daŭris 10 minutojn, ĉiutage krom dimanĉe, kaj finiĝis la 2-an de septembro.

Venis leteroj centoble ĉiutage, kiuj starigis cerbumigajn demandojn.

"Ĉu sensolve?" mi ĉuis Henriko'n.



Esperanto-kurso en la franca radio "France-Inter"

Franca televido intervjuas en la hejmo de gesinjoroj Enizan.



"Ne, fine la radio dungis du kromajn oficistojn por esplori ĉiujn demandojn."

"Kiom da leteroj entute?"

"Ankoraŭ ne scias. Daŭre alvenadas; certe superas kvin mil."

"Kion diras la direktorino de la programoj?"

"Ne scias, ĉu eblos organizi aliajn kursojn. Necesas pripensi an-

taŭ ol agi. Tiom da informpetoj maloftas."


Kion nun diros tiuj, kiuj ripetadas: "neniu interesiĝas pri Esperanto"?"

Ne estas la fino. Mi havas inviton por paroli ĉe regiona radio la 2-an de novembro je la 10-a, kaj la 23-an de novembro mi prelegos en la urbodomo de najbara urbo laŭ peto de Bahaa societo. ■

Vivo de evenkoj

Pentraĵo de WU TUANLIANG

Evenko signifas "loĝanton en arbaro". La evenkoj vivas en la Granda Xing'an (Ŝing'an)-montaro de nordorienta Ĉinio. Ili okupiĝas pri ĉasado kaj dresado de cervoj kaj loĝas en tendoj. La pentraĵo montras, ke evenka maljunulino atendas la revenon de siaj ĉasisto-familianoj, kune kun hundo kaj cervoj.



Qionglai en Suda Sichuan

Teksto de WANG QINGHUA kaj XU YE

Fotoj de XU JINYAN




Qionglai

Wenjun-strato



VETURINTE sudokcidenten je 74 km de Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco, Ĉinio, oni atingas Qionglai (Ĉjonglaj), la unuan etapon de Linguan-vojo sur la Suda Silka Vojo.

Qionglai nomiĝis Linqiong (Linĉjong) en la antikveco. Ĝi situas ĉe la limo de la sudokcidenta Chuanxi (Ĉuanŝji)-ebenaĵo kaj Qionglai-montaro. Tie regas agrabla klimato kaj prezentiĝas pitoreska pejzaĝo. Sur la montaro prosperas Qiong-bambuo. Kiam Zhang Qian (Ĝang Ĉjan), kiel sendito de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.), vojaĝis al la Okcidento, li vidis promenbastonon el tia bambuo en Daxia (Daŝja), t.e., la nuna Afganio.



(206 a.K. - 24 p.K.) oni komencis fosi putojn en Lingqiong kaj ĉerpis el ili naturan gason per bambua tubo. Ili salfaris kun natura gaso kiel hejtajo. Tiu metodo estis adoptita 1000 jarojn pli frue ol tiu en eŭropaj landoj.

La ferfando en Linqiong komenciĝis des pli frue. En Qionglai-montaro konserviĝas abundo da fer-erco. La fero el tia erco estas bonkvalita kaj tre bonvena al diversnaciaj popoloj de sudokcidenta Ĉinio. Ankaŭ la uzado de feraĵoj estis multe utila al malfermo de la Suda Silka Vojo.

La tia ferfandado ŝuldis sian prosperon al la peniga entreprenado de Zhuo Wangsun (Ĝuo Ŭangsun). En 228 a.K. Qin(Ĉin)-regno pereigis Zhao(Ĝao)-regnon. Por ke la plutokratoj de Zhao ne faru ribelon, Qin-registaro transloĝigis ilin al la fora Sichuan-provinco. Inter la transloĝiĝintoj estis ferfandisto Zhuo Wangsun. Malgraŭ la longa vojaĝo kaj barado de Qinling-montaro, li alvenis al Jiameng de Sichuan (la nuna

En la antikveco Linqiong famiĝis pro sia plej frua uzado de natura gaso kaj posedo de la tekniko de ferfandiĝo, kaj nun ĝi estas konata kiel produktejo de vino kaj cer-

amikaĵoj.

ANTIKVA FERFANDADO

Historia libro diras, ke almenaŭ en la Okcidenta Han-dinastio

La Popola Parko



Zhaohua de Guangyuan) kaj poste al Linqiong. Tie li dungis malriĉulojn por ekspluati la ferminejon kaj vendis feraĵojn en la provincoj Sichuan kaj Yunnan. Tial li fariĝis granda riĉulo kun milo da sklavoj. Ankaŭ feraĵisto Cheng Zheng (Ĉeng Ĝeng) de Shandong-provinco havigis al si tie centojn da sklavoj por fari feraĵojn. Li fariĝis riĉulo simila al Zhuo Wangsun.

Hodiaŭ, la malnova loĝejo de Zhuo Wangsun fariĝis parko. En la parko estas zigzaga koridoro, artefarita monteto kaj blua lageto kun lotusfloroj. Tie vidiĝas ankaŭ la kiosko Guweng, kie drinkis Zhuo Wangsun siatempe.

LANDO DE VINO

Ambaŭflanke de la 10-kilometra ĉefstrato de la gubernia urbo de Qionglai viciĝas butikoj kun abundo da varoj. En la urbo ŝvebas ebriga odoro de vino.

De antikve Qionglai estas honorita kiel lando de vino. Ĝi estas produktaĵo de Wenjun-vino fama

tra Sichuan. Por fari vinon oni uzas bonkvalitan fontakvon, fajnan rizon kaj fermentigas la solidajn ingrediencojn per gisto el tritiko kaj hordeo en vinkelo. Post plurjara konservado la vino elspiras apartan bonodoron.

Koncerne Wenjun-vinon, cirkulas interesa legendo. En la Okcidenta Han-dinastio vivis en Chengdu Sima Xiangru (Sima Ŝjangju), erudicia kaj lerta en verkado de *fu*-o (unu el la literaturaj formoj) kaj skermado. Li estis amiko de la tiama guberniestro de Linqiong kaj ofte veturis tien. En la kontakto kun eminentuloj kaj plutokratoj li enamiĝis al Zhuo Wenjun, filino de Zhuo Wangsun, kaj forkondukis ŝin al Chengdu, sen permeso de ŝiaj gepatroj. Tiam ili estis malriĉaj kiel preĝejaj musoj kaj devigite revenis al Linqiong. La geedzoj faris vinon en la loko, vendis ĝin kaj vivis modestan vivon. Komence, Zhuo Wangsun opiniis humiliga la edziniĝon de sia filino al malriĉa Sima Xiangru, sed

poste, pro kompato li, donis al ili 100 sklavojn kaj milionon da moneroj. Dank' al tio, la junaj geedzoj fariĝis riĉuloj en Linqiong. Tiu amhistorio faris la antikvan urbon pli romantika. Nun en la suda urbo kondukas strato. Ambaŭflanke de ĝi viciĝas antikvaj graciaj loĝdomoj kaj multaj drinkejoj kun fajnaj vinoj produktitaj de la loko. La ruino de la vinbutiko funkciigita de Sima Xiangru kaj lia edzino ankoraŭ bone konserviĝas sur la strato. Tie estas allogaj antikvaj putoj, cisterno kaj Qiong-bambuoj, pavilonoj kaj groteskaj rokoj.

Trans la strato lokiĝas la fama vinfarejo Wenjun, kiu disvolviĝis surbaze de la antikva vinproduktaĵo. La vinkeloj, kiuj funkciis en la jaroj 1573-1620, ankoraŭ konserviĝas en la vinfarejo kun 1300 laboristoj kaj oficistoj. La ŝtata vinfarejo produktas 23 specojn da vinoj, kiuj vendiĝas en pli ol 20 provincoj de Ĉinio kaj ankaŭ en Usono, Japanio kaj sudorienta Azio. En

La unua ponto de suda Sichuan





Butiko de bambuaj plektaĵoj

En la vinfarejo Wenjun

1986 14 tunoj da Wenjun-vino vendiĝis en Hongkongo, Aomen kaj sudorienta Azio kaj en 1987 ĝia eksporta kvanto atingis 41 tunojn. La vino estis premiita per ora medalo por fama ĉina eksportita produkto en 1987.

En la vinfarejo estas pli ol 30 fontoj kun dolĉa akvo. Ĉiutage almenaŭ milo da tunoj da akvo estas ĉerpita por fari vinon.

MILJARAJ CERAMIKAĴOJ DE QIONGLAI

Sude de la guberniurbo de Qionglai estas ponto. Transe de ĝi sterniĝas alta laterita deklivo. Tie situas la Qionglai-a Fabriko de Artaj Ceramikaĵoj.

Heredinte la ceramikon de la antikva Qiong-bakujo, la fabriko imitas ingrediencojn, formojn kaj grazuradon de elterigitaj ceramikaĵoj kaj de tempo al tempo renovigas la teknologion, tiel ke la imitaĵoj estas preskaŭ ne distingeblaj



de la antikvaj. La ĉ. 200 specoj da produktoj de la fabriko estas ŝatataj de ĉinoj kaj alilandanoj.

La elterigitaj Qiong-

ceramikaĵoj plejparte estas ĉiutagaj vivbezonaĵoj, kiaj bovloj, vazoj, fornoj, urnoj, vinujoj, ritaj instrumentoj, brikoj k.a. Estas pli ol



Budhostatuo sur la monttalo

20 koloraj glazuroj por ceramikaĵoj. Kaj krome, estas ankaŭ ceramikaĵo kun floroj kaj herboj farbitaj blue, brune kaj verde, kiun oni nomas trikolora Qiong-ceramikaĵo.

Qiong-ceramikaĵo famiĝis pro sia longa historio kaj bonkvalito kaj Qiong-bakujo estis unu el la antikvaj privataj bakujoj kun granda famo kaj okupas gravan lokon en la historio de ceramiko. Qiong-bakujo ekfunkciis en Suidinastio (581-618), prosperis en Tang-dinastio (618-907), dekadencis en Song-dinastio (960-1279) kaj nun restas nur ĝia ruino. Ĝi estis unu el la plej antikvaj kaj plej multe produktantaj bakujoj en Sichuan.

Privataj bakujoj troviĝis en multaj lokoj. Inter ili la plej tipa estas la ruino de la bakujo Shifangtang ĉe la rivero sude de la guberniurbo. En la areo de 100 000 kvadrataj metroj ĉe vidiĝas pecoj de ceramikaĵoj kaj bakinstrumentoj. Nun tie punktiĝas 13 bakujoj, el

kiuj la plej granda altas almenaŭ 10 m kaj la plej malgranda nur 4 m. Oni malkovris ankaŭ ruinojn de loĝdomoj de Tang-dinastio en la regiono, dank' al kio ni pli multe konas la antikvan ĉinan arkitekturon.

ĈE LIMO DE MONTO KAJ EBENAĴO

Qionglai situas ĉe limo de monto kaj ebenaĵo. Okcidente de ĝi kuŝas lago kaj sude staras pagodo. Ili estas kvazaŭ limsignoj de la monto kaj ebenaĵo.

5 km okcidente de la urbo Qionglai estas Qionglai-montaro. Tie kuŝas la lago Zhuxi (Ĝuŝji). Super la ondetanta lago ŝvebas nebulo. Ĉe la bordo pompas altaj antikvaj arboj kaj kantas birdoj. Estas agrable la lokon viziti!


Per boato oni povas atingi la Insuleton de Milbudha Klifo meze de la lago. La Surroka Statuaro de Huazhi-templo sur la insulo estis

ekkonstruita en Tang-dinastio. La templo antaŭ longe jam malaperis. Nun tie restas grandaj kaj malgrandaj budhostatuoj ĉe la monttalo. Sur la rokmuro estas mil malgrandaj budhostatuoj, kiuj impresas harmonie. Maldekstre de ili staras granda budhostatuo, kiu aspektas majesta kaj impona.

Unu km sude de la guberniurbo, apud la unua ponto de suda Sichuan staras la alta pagodo Huilan, kiu estis konstruita en Qing-dinastio (1644-1911). Ohi povas ascendi ĝin laŭ la ŝtuparo, kies supra parto jam kaviĝis pro longtempa paŝado. Rigardante orienten kaj norden ĉe la supro, oni povas vidi vastan kamparon sur la ebenaĵo Chuanxi (Ĉuanŝji); kaj rigardante okcidenten kaj suden, oni povas vidi montaron kunfandiĝantan kun la horizonto. Supre, sur la ĉielo ŝvebas blankaj nuboj, kaj sube trankvile ripozas la antikva urbo. La morusfolioj susuretas en venteto kaj la riveroj fluas senbrue. Kia agrable pezaĝo!

Descendinte la pagodon kaj traŭrinte la unuan ponton, oni rimarkas, ke Lingguan-vojo ŝovas sin en la pompan montaron kaj de tie la vojo fariĝas pli mallarĝa kaj malglata. ■

Ceramikaĵo produktita en Qionglai



Prospero de Zaĝju-opero en Yuan-dinastio

kaj la Granda Dramisto Guan Hanqing

de MEI ZHI

EN 1279 p.K. Kublajo, nepo de Ĝingis-Hano, pereigis la Sudan Song-dinastion kaj unuigis Ĉinion. De tiam komenciĝis Yuan-dinastio (1279-1368).

El la literaturo de Yuan-dinastio *zaĝju*-opero estis plej elstara. Yuan-dinastio estis flora epoko de la ĉina dramaturgio. Ĝi trapasis longan burĝonan periodon kaj formiĝis multe pli malfrue ol la teatro en iuj aliaj landoj, kiaj la antikvaj Grekio kaj Hindio. Komence de la dinastioj Tang kaj Song, rakontoj,



ci-oj, ĉju-oj, parol-kanta literaturo, Hangyuan-teatro, dialogo-kantaj rakontoj kaj aliaj artaj formoj de la periodo Song kaj Jin metis la bazon por la naskiĝo de *zaĝju*-opero. En la lastaj jaroj de Song-dinastio kaj la unuaj jaroj de Yuan-dinastio finfine naskiĝis kaj prosperis la ĉina teatro.

Zaĝju-opero de Yuan-dinastio estis nova arta formo, kreita surbaze de Hangyuan-teatro kaj dialogo-kantaj rakontoj, ĝi vaste sorbis ci-ajn melodiĝojn kaj ludartojn. Ĝiaj melodiĝoj kaj muzikaĝoj venis ĉefe el tiuj cirkulantaj en la nordo de Ĉinio siatempe. *Zaĝju*-opero ĝenerale konsistis el kvar aktoj. Ĉiu akto estis muzika unito, ankaŭ natura paragrafo de la intrigoj kaj ĝenerale havis plurajn scenojn. Iuj teatraĵoj havis mallongan interludon, sen fiksa pozicio, ĝenerale antaŭ la unua akto por koncize prezenti la enhavon de la opero. Unu peco de teatraĵo ĝenerale estis ludata kaj kantata de unu ĉefa rolulo (ino), la aliaj roluloj faris nur dialogojn. La roluloj de *zaĝju*-opero havis rigoran labordividon, malsamaj roluloj ludis malsamajn personojn. Ekz., la ĉefrolulo por ludi la pozitivan personon nomiĝis *zhengmo* kaj ĉefrolulino *zhengdan*.

Kiel matura teatro, *zaĝju*-opero ne nur enhave riĉigis la rakontojn longe cirkulantajn en la popolo, sed ankaŭ vaste spegulis la tiaman socian realon. Yuan-dinastio estis fondita de mongoloj. Antaŭ la unuigo de Ĉinio la mongoloj troviĝis en sklava socio ne plene disvolviĝanta. Pro tio la politiko, ekonomio kaj kulturo de Yuan-dinastio prezentiĝis en komplekso. En la agrikulturo kaj metio aperis grandskala sklavo-laboro, kio multe pezis mizeron de la popolo kaj akriĝis la nacian kaj klasan kontraŭdirojn. Tiu socia realo pretigis al *zaĝju*-opero abundajn materialojn. Aliflanke, la regantoj de Yuan-dinastio aplikis diversajn rimedojn por disvolvi la produktadon, kio prosperigis la komercan ekonomion de urboj. Tiam en sudaj kaj nordaj grandaj urboj aperis ludejoj de diversaj artoj, multaj eminentaj dramistoj kaj aktoroj. Tiam en la socio la intelektuloj havis tre malaltan pozicion kaj vivis mizere. Tia situacio ebligis al ili kontakti kun subtavolaj popo-

lanoj kaj fari verkojn pri ilia vivo, kaj sekve de tio riĉiĝis la enhavo de *zaĝju*-opero.

Koncernaj materialoj montris, ke en Yuan-dinastio estis pli ol 80 dramistoj de *zaĝju*-opero, kiuj postlasis pli ol 500 dramojn. Guan Hanqing estis plej granda dramisto en la antikva Ĉinio. Li vivis en la komencaj jaroj de Yuan-dinastio en norda Ĉinio. Nun oni ne scias la datojn de liaj naskiĝo kaj morto. Li majstris en kantado kaj dancado kaj pri metriko. Li ne nur verkis multajn dramojn, sed ankaŭ ofte sursceniĝis por ludi dramojn.

Guan Hanqing estis fekunda dramisto. Li verkis entute 63 dramojn. Bedaŭrinde la plejparto de ili estis perdita. Nun oni povas legi nur 12 el liaj dramoj. Inter ili "Maljusto al Dou E" estas lia reprezentanta verko.

"Maljusto al Dou E" estis dramo verkita de Guan Hanqing en liaj lastaj jaroj. Ĝi estas kortuŝa tragedio. Ĝi priskribas, kiel malfeliĉa virino Dou E estis maljuste kondamnita al morto kaj kiom forta estis ŝia indigno. La tragedio malkaŝis la kruelan socian realon, en kiu tirana kanajlo murdis pro riĉaĵo, nebulkapa prefekto ne kapablis en juĝado kaj ne zorgis pri la homa vivo. La dramo montras fortan oponon de la popolo. La heroino Dou E en la aĝo de 3 jaroj perdis sian patrinon, 7-jare forlasis sian patron kaj fariĝis infana bofilino de Cai-familio. Kiam ŝi estis 17-jara, mortis ŝia edzo. De tiam ŝi fariĝis vidvino kaj vivis kune kun la bopatrino. Iufoje, ŝia bopatrino eliris por depostuli ŝuldon, survoje ŝi renkontis Sai Luyi, kiu intencis mortigi ŝin pro la mono. Ĝuste tiam la kanajlo Zhang Lu-er kaj lia patro savis ŝin. Tion pretekstante, Zhang kaj lia patro enloĝiĝis en la domon de la virinoj kaj intencis preni Dou E kaj la bopatrinon kiel sian edzinon respektive. Zhang Lu-er intencis veneni la maljunulinon, sed li misvenenis sian patron. Por sin senkulpigi, li atribuis al Dou E la venenan murdon kaj minacis, ke li denuncos ŝin al la loka registaro, se ŝi rifuzos edziniĝi al li. Sed Dou E preferis iri al la loka registaro ol obei Zhang Lu-er. Tiam en la okuloj de Dou E la prefekto estis justa kaj kredebla. Ekster ŝia atendo, la prefekto de Chuzhou subaĉetita de la denunciinto ne aŭskultis senkulpigon de Dou E kaj severe torturis ŝin. Ŝi svenis trifoje de la torturo. Ŝi disreviĝis. Vekiĝinte el la sveno, ŝi plore kantis:

*Je paŭzo de l' torturo
ekvidas la okuloj;
mi tuj denove svenas.
Teruran torturadon mi suferas,
min per minacoj ili premas.
Makuloj sangaj sur la vest' aperas,
ŝiriĝas mia haŭto
spro l' bastonbata plaŭdo.*

Fine ŝi faris falsan konfeson pri veneno de la patro de Zhang Lu-er. La sinsekvaj malfeliĉoj faris Dou E

firmkarakteraj. Ŝi indigne riproĉis la malluman realon:

*La juĝejo ĉiam frontas al la sudo,
Ene neniam estas justo.*

En la tria akto Dou E estis kondamnita al morto kaj kondukota al la ekzekutejo. Tiam ŝia rezistemo fariĝis pli forta, ankaŭ la intrigo de la dramo atingis sian kulminon. La bonkora kaj milda Dou E en senespero indigne blasfemis la Ĉielon kaj la Teron decidantajn la homan sorton:

*La suno kaj la luno zorgas pri la tempa ordo,
Dio kaj Hadeso regas super homnaskiĝo kaj hommorto.*

*Kial vi misrigardas honestulon fia homo?!
Kial bonfaraj homoj suferadas kaj la vivon perdas frue,*

dum uloj malbonfaraj havas riĉon kaj longvivon ĝue?!

*Vi timas la potencon kaj molestas la mizeran,
sen justecamo eĉ malhelpas la suferan!*

Ho, Tero, ĉu vi estas Tero, se vi miksas bonon kaj malbonon?

Ĉielo, ĉu vi estas tio, se konfuzas vi bonulon kaj fihomon?!

Ho ve, krom larmoj jam nenio restas al mi en dispono!...

Antaŭ la ekzekuto, ŝi eldiris siajn tri ĵurpetojn por pruvi la maljustan kondamnon: Ŝia sango ŝprucos supren sur la blankan silkaĵon kaj neniom falos teren, tri futojn dika neĝtavolo kovros la teron en la sesa monato kaj Chuzhou suferos 3-jaran trosekecon. Guan Hanqing romantikisme efektivigis siajn tri ĵurpetojn, pliigis la tragikan etoson de la dramo kaj pliprofundigis la temon. Tio montris la klarajn amon kaj malamon de la dramisto.

Guan Hanqing estis majstra en skulptado de personaj figuroj, precipe de virinoj. Tiuj virinoj plejparte estis malaltaj en la socia pozicio, profunde subpremataj kaj damaĝataj de la feŭda socio. Kun granda simpatio Guan Hanqing prezentis ilian tristeton kaj plendon, bildigis ilian bonkorecon, saĝon kaj rezolutecon. En liaj dramoj tiuj virinoj estis vivoveraj kaj profundimpresaj. Ekz., Du Ruinian kaj Yanyan estis prostituitino kaj sklavknabino, sed ili havis fortan aspiron al la amo. La avino Wang en la dramo "Papilia Songo" estis patrino afabla kaj sinoferema. Tan Jier, heroino en la dramo "Wangjiangkiosko", estis edzino de ordinara etoficisto. Informiĝinte, ke Yang Yanei kun imperiestra ordono alvenas por forporti la kapon de ŝia edzo, ŝi montris nenian timon. En la punkto de Aŭtunmeza Festo, ŝi, alivestita kiel fiŝistino kun preteksto prezenti fiŝon al Yang, venis al la kiosko kaj plene mistifikis Yang Yanei. Ŝi verŝis sur tiun fiulon komplimentojn,

ebriigis lin en drinkado kaj ekstazigis lin en poem-
verkado. Fine ŝi sukcese forportis la imperiestran
ordonon kaj oficialan dokumenton. Antaŭ sia foriro
ŝi mokis nebulkapan aĉulon:

Mi min returnas

Kaj faras al via moŝto dankon profundan...

La personoj sub la plumo de Guan Hanqing havis
klaran individuecon. En konfliktoj la individueco de
la roloj estis plene prezentita. Guan Hanqing maj-
stris kapti ilian psikan ŝanĝigon por prezenti la
individuecon. Ekz., en la teatraĵo "Lu Zhailang",
kiam Zhang Gui minacata de loka tirano Lu Zhai-
lang devigite donacis al tiu kanajlo sian edzinon, li
kantis kanton, kiu unu el la plej brilaj animaj mon-
ologoj el la ĉinaj klasikaj teatraĵoj:

*Lu Zhailang kun rabbesta kanajlband' en
koopero*

*kondutas kontraŭ leĝoj de la Tero kaj l' Ĉielo,
kruele apartigis filon de l' patrino,
perforte li disigis edzon de l' edzino.
Se de antikve l' sun' kaj lun' eklipsas je hommiro,
ĉu iam la edzinon l' edz' parigis kun fremd-viro?!
Hodiaŭ l' edz' aranĝas rean nupton por l' edzino,
kaj ankaŭ donas doton al ŝi por l' okazo;
abundas tie ŝafoj, vino kaj silkaĵoj...*

La arioj plene prezentis la komplikitan animan
konflikton de Zhang Gui en fortaj aflikto, honto kaj
indigno.

Guan Hanqing montris sian elstaran talenton an-
kaŭ en la strukturo kaj lingvo de teatraĵoj. En la
pasintaj pli ol 700 jaroj oni senĉese surscenigis div-
ersajn teatraĵojn adaptitajn laŭ la verkoj de Guan
Hanqing. ■

ELEKTITA VERKO DE GUAN HANQING

Maljusto al Dou E

(Fragmento)

de GUAN HANQING

TRIA AKTO

Ekzekuta inspektoro (envenas kaj diras): Mi estas la
ekzekuta inspektoro. Hodiaŭ estos ekzekuto kaj mi
ordonis al gardistoj fermi la stratbuŝojn, ke irantoj
ne ĝenu nin. (Gardisto envenas kaj faras gestadon,
kvazaŭ li tamburadus kaj gongus po trifoje. Poste li
eliras. Kun flago en unu mano kaj glavo en la alia,
la ekzekutisto envenas eskortante Dou E en ka-
tenoj.)

Ekzekutisto: Iru, iru, sinjoro ekzekuta inspektoro
jam iris al la ekzekutejo antaŭ longe.

Dou E (kantas laŭ la melodio Duanzhenghao):

*Mi ja nenion faris kontraŭ leĝa deco,
sed min subite trafis la katena pezo,
al la Ĉiel¹ mi plendas pro l' terura maljusteco!
Animo mia baldaŭ estos ĉe la reĝo de l' infero,
kiel mi povus ne kriplendi al la Tero¹ kaj Ĉielo!...*

(Kantas plu laŭ la melodio Gunxiuqiu:)

*La suno kaj la luno zorgas pri la tempa ordo,
la Dio kaj Hadeso regas super la naskiĝo kaj la
morto.*

Kial vi misrigardas honestulon fia homo?!

*Kial bonfaraj homoj suferadas kaj la vivon perdas
frue,*

*dum uloj malbonfaraj havas riĉon kaj longvivo-
n?!*

*Vi timas la potencan kaj molestas la mizeran,
sen justecamo eĉ malhelpas la suferan!*

*Ho, Tero, ĉu vi estas Tero, se vi miksas
bonon kaj malbonon?!*

*Ĉielo, ĉu vi estas tio, se konfuzas vi
bonulon kaj fihomon?!*

*Ho ve, krom larmoj jam nenio restas al mi en
dispono!...*

Ekzekutisto: Iom rapidu kaj ne malfruiĝu.

Dou E (kantas laŭ la melodio Changxiucai):

*Mi ŝancelpaŝas en la peza kolkateno,
puŝate de la homoj stumblas mi kun peno.*

Permesu al mi diri vortojn, frat', kun kompatemo.

Ekzekutisto: Kion vi volas diri?

Dou E (kantas):

*Mi bedaŭregos, se l' antaŭan straton ni trairos;
se tra la posta strat' ni iros, do mi ne suspiros.*

Ne diru, ke pli longan vojon ni ja iros.

Ekzekutisto: Nun vi iras al la ekzekutejo. Se vi
havis parencon, vi povus lin alvoki por intervidiĝi
ankoraŭfoje.

Dou E (kantas laŭ la melodio Daodaoling):

*Mi estas sola, sen parencoj, kompatindulino,
kaj povas nur akcepti ĝeme la maljustan
punon je la fino.*

Ekzekutisto: Ĉu vi eĉ ne havas parencon el la patrina familio?

Dou E: Mi havas nur patron, kiu foriris al la kortego por ekzameniĝo antaŭ dek tri jaroj, sed ĝis nun venis de li neniŭ letero. (Kantas:)

Pli ol dek jarojn mi ne vidis la vizaĝon de la patro.

Ekzekutisto: Kial do vi diris, ke ni iru tra la posta strato?

Dou E (kantas):

Mi timas vidi l' bopatrino en la fronta strato.

Ekzekutisto: Eĉ propran vivon vi jam ne povas zorgi, kial do vi timas vidi ŝin?

Dou E: Se mia bopatrino vidus, ke mi en katenoj iras al la ekzekutejo por ke mia kapo estu dehakita (kantas):

*Tio nur ĉagrenos ŝin ĝis morto,
vere nur ĉagrenos ŝin ĝis morto!*

Mi petas, estimata frato,

bonvole faru al mi tiun lastan bonon el

mizerikordo!

Bopatrino de Dou E (envenas plorante kaj diras):
Ho, Ĉielo! Ĉu tio ne estas mia bofilino!

Ekzekutisto: Ne proksimiĝu, maljunulino.

Dou E: Se mia bopatrino jam alvenas, do alvoku ŝin, ke mi diru kelkajn vortojn al ŝi.

Ekzekutisto: Venu, maljunulino, via bofilino havas vortojn por diri al vi.

Bopatrino: Ho ve, mia infano!

Dou E: Panjo, Zhang Lŭer venenis la ŝafstomakan supon por murdi vin kaj perforte preni min kiel sian edzinon. Sed neatendite vi cedis la supon al lia patro kaj sekve li estis mortigita. Mi timis, ke vi implikiĝos en la proceso, tial mi faris falsan konfesion, ke mi venenis la maljunulon, kaj hodiaŭ mi iras al la ekzekutejo por puno. Kara panjo, en la estonteco, bonvole oferu al mi duonbovlon da supo en festotaĝoj kaj bruligu al mi iom da papermono² por via forpasinta infano! (Kantas laŭ la melodio kuaihuo-san:)

*Kompatu, ke vi viktimiĝos pro maljusta frapo;
kompatu, ke mi mortos kun apartigitaj korp' kaj kapo;*

*pro ke mi en pasintaj jaroj faris hejmlaborojn;
ho, bopatrino,*

pro ke mi ne ĝuadis la gepatrajn korfavorojn;

(Kantas plu laŭ la melodio Baolaoer:)

*pro ke dum jaroj mi vin servis per la hejmokupo,
oferu al mi bovlon da malvarma supo.*

Mi petas, ke vi forbruligu papermonon

super la kadavro mia,

kvazaŭ oferon farus al la forpasinta filo via.

Bopatrino (ploras): Trankviliĝu, tion mi faras. Ho, Ĉielo, mi mortos de ĉagreno!

Dou E (kantas):

Ho, panjo,



*ne plu verŝadu larmojn pro l' maljusta premo,
ne flamu per indigno kaj ĉagreno.*

*La malfeliĉo trafis min pro mia nigra sorto,
kaj malprudenta forto
kondamnis min al morto.*

Ekzekutisto (krias): Foriru, maljunulino, jam estas tempo.

Dou E (genuiĝas): Sinjoro ekzekuta inspektoro, mi havas unu peton al vi. Se vi ĝin plenumus, mi mortus sen bedaŭro.

Ekzekuta inspektoro: Diru, kion vi petas?

Dou E: Mi petas puran maton, ke mi staru sur ĝi, kaj dek du futojn da blanka silkaĵo por pendigi sur la flagstangon. Se la ekzekuto al mi estas vere maljusta, kiam mia kapo falos je glavhako, mia varma sango ŝprucos supren sur la silkaĵon kaj neniom falos teren.

Ekzekuta inspektoro: Mi konsentas, tio ne gravas.

(La ekzekutisto gestadas, kvazaŭ li alportus maton por starigi Dou E sur ĝi, kaj poste alportus blankan silkaĵon por pendigi sur la flagstangon.)

Dou E (kantas laŭ la melodio Shuahaier):

*Mi faris peton miran por prudento,
ja pro l' terura maljustec' en evidento.
Se ne okazus pro ĝi ia miraklaĵo,
ne restus sankta la lazura firmamento.
Mi volas, ke neniŭ gur' el mia sango falu*

al la tero,

*sed ĉiom flugu sur la blankan silkon en l' aero,
ke ĉiuj ĉeestantoj vidu per l' okuloj,
ke vi ja estas senkulpulo*

kaj vera honestulo.

Ekzekutisto: Kion vi ankoraŭ volas diri al sinjoro inspektoro? Se ne nun, kiam do ankoraŭ?

Dou E (refoje genuiĝas): Sinjoro inspektoro, nun estas varmega somero. Se mi viktimiĝos vere maljuste, post mia morto tri futojn dika neĝtavolo kovros la teron kaj mian kadavron.

Ekzekuta inspektoro: En tiel varma somero, eĉ se vi sentus ĝisĉielan indignon pro maljusteco, vi ne povus esti eĉ unu neĝflokono. Ne diru sensecaĵon!

Dou E (kantas laŭ la melodio Ersha):

*Vi diras, ke nun varmas la aero
kaj por neĝadi nun ne taŭgas la vetero.
Ĉu vi ne aŭdis, ke pro Zou Yan³ neĝis en somero?
Se pro l' maljusto brulas la indigno en la sino,
eĉ en somer' kotonlanuge falos neĝ' sen fino
kaj kovros mian dishakitan korpon,
ke ne necesos blankaj ĉaro kaj ĉevalo⁴
por porti la restaĵojn miajn al kamparo!*

(Ŝi genuiĝas denove kaj diras) Sinjoro inspektoro, mia ekzekutiĝo estas vere maljusta. Ekde nun, tiu ĉi distrikto suferos trosekecon dum tri jaroj!

Ekzekuta inspektoro: Vangfrapon vi meritas! Kian maldecaĵon vi diras!

Dou E (kantas laŭ la melodio Yisha):

*Vi diras, ke miraklon ne atendu mi de la Ĉielo,
ĝi ne kompatos min pro la sufero.*

Do vi ne scias, ke l' Ĉielo vole faros laŭ la homespero.

Kial ne estos bona pluvo dum tri jaroj?

Pro l' okazaĵ' simila al tiu de la vidvino ĉe la Orienta

Maro.⁵

Ĉi-foje Shanyang-gubernion trafos jam fatalo.

*Ĉar la juĝistoj ne devigas sin laŭleĝe bonkondukti,
la popolanoj antaŭ maljusteco devas muti.*

Ekzekutisto (svingas la flagon): Kial malsereniĝas subite? (Aŭdiĝas susuro de vento.)

Dou E (kantas laŭ la melodio Shawei):

*Per nuboj la Ĉiel' pro mi malhelos,
indigna turnovento pro mi ekkoleros,
tri voloĵojn miajn mi jam klare diris.*

(Ŝi ploras kaj diras.) Ho, bopatrino, kiam neĝos en la sesa monato kaj okazos trijara trosekeco, (kantas:)

mia fantomo de maljust-vikano tiam reaperos.

(Ekzekutisto eksvingas sian glavon, hakas kaj Dou E falas teren.)

Ekzekuta inspektoro (surpriziĝas): ha, vere ekneĝas! Kia mirindaĵo!

Ekzekutisto: Je ekzekuto ordinare la sango verŝiĝas sur la teron, sed la sango de Dou E ĉiom ŝprucis sur la blankan silkaĵon kaj neniom falis teren. Vere mirinde!

Ekzekuta inspektoro: La ekzekuto certe estas maljusta. Ŝiaj unuaj du deziroj jam realiĝis; ni ne scias, ĉu okazos ankaŭ trijara trosekeco. Ni atendu kaj vidu. Viroj, ne atendu ĝis ĉeso de la neĝado, jam nun portu ŝian kadavron al maljunulino Cai.

(Ĉiuj jesas kaj portas la kadavron el la scenejo.)
Elĉinigi Laŭlum

1. Ĉielo kaj Tero estas diecaj laŭ superstiĉa kredo de antikvaj ĉinoj.

2. Laŭ ĉina superstiĉo, la fantomoj de mortintoj ricevas por sia bezono la papermonon por mortintoj ofere bruligitan de la parencoj.

3. Zou Yan, lojala kortegano de regno Yan en la Periodo de Militantaj Regnoj (475 - 221 a. K.), estis enkarcerigata pro kalumnio pri li. Li eklamentis pro la maljustaĵo kaj la Ĉielo estigis neĝadon en somero. Multaj ĉinaj literaturaj verkoj menciis tiun legendon.

4. En la Orienta Han-dinastio (25 - 220 p. K.), Fan Shi veturis per blanka ĉaro tirata de blanka ĉevalo por funebri sian intiman amikon Zhang Shao. Poste, oni rigardas blankajn ĉevalon kaj ĉaron kiel funebran signon. En tiu ĉi opero, oni parolas pri funebra ĉaro por transporti kadavron. Legendo diras, ke en Han-dinastio (206 a. K. - 220 p. K.) vivis ĉe la Orienta Maro vidvino nomata Zhou Qing (Ĝou Ĉing), kiu tre bone amzorgis sian bopatrino. Por liberigi la bofilinon de peza ŝarĝo, la bopatrino sin pendigis. Ŝia filino akuzis Zhou Qing pri murdo kaj tiu ĉi estis maljuste kondamnita al morto. Ĉe la ekzekuto, ŝi diris, montrante al la stango al kiu ŝi estis ligita, ke ŝia sango fluos supren anstataŭ malsupren pro la maljusta ekzekuto. Poste, vere tio okazis kaj trosekeco trijara trafis tiun regionon.

Solvoj por konkurso de EPĈ-amikoj

1. (b. Ĉongĉing) 2. (c. Daĉing) 3. (c. planizita kaj merkata ekonomio en kombino) 4. (b. Ĝuangdong) 5. (b. "Ruĝaj Sorgoj") 6. (c. 2000) 7. (b. Ŭang Ŭej kaj Meng Haŭĵan) 8. (a. Baj Ĝjuĵi) 9. (a. Zigong) 10. (b. Turpan) 11. (Ĉarhan) 12. (b. Ŝja) 13. (b. bulangoj) 14. (b. fajenco) 15. (b. 12) 16. (c. Kantono) 17. (c. Ŝanhajo) 18. (b. 2) 19. (b. 2) 20. (b. Pekino)

Gajnintoj de la unua premio: Dieter Dungere (DDR), Julieta Dragomir (Rumanio), Leonido Kurakin (USSR), Helene Falk-Bracke (Belgio)

Gajnintoj de la dua premio: David G. Valezillos V. (Venezuelo), Stanka Starĉević (Jugoslavio), Rieche Jan (DDR), Živana Petošević (Jugoslavio), Kuse Ralf (DDR), Ristic Verica (Jugoslavio), Louis Marmoex (Francio), Alice Amalia Klein (Brazilo)

Gajnintoj de la tria premio: Atilio Orellana Rojas (Argentino), Djurdjević Saveta (Jugoslavio), Djurdjević Ljiljaha (Jugoslavio), Wylleman Raymond (Belgio), Rodić Predrag (Jugoslavio), Yamaguti Mitio (Japanio), Rita Aagaard (Nov-Zelando), Ramon Xavier Martinez (Brazilo), Anatolij Ŝepelov (USSR), Gazikalović Dragana (Jugoslavio), János Tibor (Rumanio), Schertzer Edouard (Francio), Hámon (Francio), Achim Meinel (GDR), Marija K. Branko Repac (Jugoslavio), Nataša Jakovljević (Jugoslavio), Hubert Boving (Belgio), Konrad Locmelis (USSR), Djurdjević Milorad (Jugoslavio), Cornelius J. Mckown (Usono), Franz Peter Kurtz (DDR), M. Burgmeister (USSR), Josef Vojáček (ĈSSR), Podianova Ludmila (USSR), Oonisi Sin'iti (Japanio), Clary Françoise (Francio), Chevalier Jean (Francio), Klaus Wittwer (DDR), Horst Theurich (DDR), Fidel Figueroam (Meksikio)

KORPOSANIGAJ METODOJ (VII)

5. Alte levu la genuojn, per ili premu la vangojn kaj sidu kun la manoj apogataj sur la planko (Bildo 1). Longa ekzercado per tiu metodo povas forigi malmolaĵon, akumultitan likvaĵon aŭ gason, formitan pro apepsio. La ekzercado ankaŭ povas plifortigi la intestan funkcion kaj plifirmigi la ostojn.

6. Sidu kun rekta talio, elstarigu la bruston kaj levu la kapon. Tenu la fingrojn de la manoj unu kontraŭ alia kaj post tio forte premu la plankon per ambaŭ manoj (Bildo 2), dume mallevu la kapon kaj bruston kaj relevu ilin, kiam ili proksimiĝas tuj al la planko. Faru la samon 14 fojojn. La ekzercado povas forigi malmolaĵon en la brusto kaj inter akselo kaj talio, visceran malvarmon kaj doloron de la talio, brakoj kaj spino.

SANPROTEKTAJ METODOJ POR URINA SISTEMO KAJ GENERA SISTEMO

DIFEKTIĜO:

1. Sidu sur la kalkanoj kun la korpo apogata per la piedfingroj sur la planko kaj tenu la plandojn kunmetitaj kun la genuoj eksteren kaj la manoj malsupren antaŭ la brusto (prenu la pozon adorkliniĝan dum elspiro). Faru la samon 7 fojojn laŭeble. Tio estas utila por forigi difektiĝon, genuan malvar-


mon, lienan marasmon kaj renan perturbiĝon.

2. Kuŝu kun la manoj sur la genuoj kaj la kalkanoj sub la gluteoj (Bildo 3). Enspiru per la buŝo kaj elspiru per la nazo, kiam vi sentas la ventron troŝveliĝanta. Faru la samon 7 fojojn. Tio povas kuraci disurion, diurezon, subven-

man gason en la veziko, malvarmon kaj doloron de la piedoj kaj lumbalgion.

RENAJ MALSANOJ:

1. Sidu kun la piedoj krucitaj, per la manoj tenu la tarsojn de la kontraŭaj piedoj kaj tiru ilin laŭeble. Levu la kapon. Faru la samon



tran doloron aŭ mallertecon de genuaj artikoj, kaŭzitan de manko de vitala energio.

3. Se vi vin ekzercas per korposanigaj metodoj, vi devas unue ekzerci vin per rekta sidado: Kunmetu la genuojn kaj piedojn. Tenu la fingrojn de la piedoj unu kontraŭ alia kun la kalkanoj eksteren. Kiam vi sentas vin sufokita, levu vin malrapide, kaj poste sidiĝu sur la piedoj. Kiam vin ne doloras tiuj du ekzercoj, tiam tenu la kalkanojn supren, sidiĝu kun la piedfingroj eksteren. Ĉiufoje, kiam vi sidiĝas, vi ekzercu vin per tio. La ekzercado povas forigi malvar-

7 fojojn. Tio kuracas stagniĝon de vitala energio en la renoj.

2. Sidu kun la piedoj etenditaj, retenu la spiradon kaj per imago konduku vitalan energion de la akupunktura punkto *dantian* (interne de la umbiliko je ĉ. 4 cm) al la kalkanoj trifoje. Kiam la energio trapenetas ilin, fleksu la dekstran kruron, forte tenu la plandon kaj tiru ĝin supren per la manoj, dum la piedo forte rezistu la tiradon. Tio daŭros kelkan tempon kaj vin malstreĉu. Faru la samon 21 fojojn. Longa ekzercado povas forigi la malvarmon en la renoj kaj genuoj kaj piedalgion. ■

(Daŭrigota)

KORESPONDI DEZIRAS

* Mia 38-j. amiko el Jugoslavio, esperantisto, dez. sezone fari kiu ajn laboron en Okcidenta Eŭropo aŭ Skandinavio. Se iu povus helpi al li skribu al: Betty Taylor, R.R.I., Okanagan Falls, BC, Canada VOH IRO.

* Sperta filatelisto akceptas daŭre kunlaboron kaj amikplenan korespondaĵojn pere de bele afrankitaj kovertoj tutmonde, kontraŭ la sama. Pli profunda filatela-interŝanĝo estas certa. Adr.: Emil

Egner, Karla Štěcha 8, Cs-370 05, Ĉeske Budějovice, Ĉeĥoslovakio.

* Gabor Fekeshazi, 22-j. studento, dez. kor. pri geologiaj temoj. Ad.: 4400-Nyiregyhaza, Strato Hunyadi nr 102, Hungario.

ESP-NOVAĴOJ

● Sub la aŭspicioj de la magistrato de la urbo Qingdao (Ĉingdaŭ) kaj ĝia Asocio de Kultur-interŝanĝo kun Aliaj Landoj, la turisma fakultato de la Qingdao-a Universitato funkciigas turisman Esperanto-kurson, kiu daŭros unu jaron, por kulturi Esperantajn ĉiĉeronojn por la urbo kaj Esperantajn laborantojn por la 5-a Pacifika Esperanto-Kongreso okazonta en la urbo en 1992. Krom Esperanto, la kurso havas ankaŭ lecionojn pri turisma teorio, ĉiĉeronado, hoteladministrado, verkado k.a. Pekinaj esperantistoj instruas Esperanton laŭ invito. En ĝi lernas sume 30 membroj.

● S-ro Honfan (Honfan), la ĉefredaktoro de la "Esperanto-Ĉina Vortaro" estas premiita de la Kultura Ministerio de Ĉinio. En la 11-a de marto la kultura ministerio okazigis kunvenon por premii meritohavajn maljunulojn. Post emeritiĝo s-ro Honfan okupiĝis pri redaktado de la vortaro kaj akiris rimarkindan sukceson.

● Lastatempe, la Higiena Departemento de la Xinjiang(-Ŝinĝjang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono okazigis la unuan Esperanto-kurson. La estro kaj vicestroj de la departemento, respondeculoj de ĉiuj ĝiaj fakoj kaj medicinaj societoj, sume 30 homoj, lernas en ĝi. La lernantoj havas lecionon dufoje posttagmeze ĉiusemajne. En la daŭro de 4 monatoj ili lernas la abocion de Esperanto, kaj poste stu-

dos pri medicina Esperanto.

● Lastatempe, iuj lokaj eldonejoj de Ĉinio eldonis nombron da Esperantaj libroj. La Eldonejo de la Liaoning(Ljaŭning)-a Universitato eldonis la libron "Demandoj kaj Respondoj por Esperanta Testo" kompilitan de Wang Fusheng (Ŭang Fuŝeng) kaj Li Lehai. La libro enhavas plenigon de blankoj, ekzercojn de frazfarado kaj tradukado, komprenadon de legaĵo, respondojn k.a. La Eldonejo de la Yanbian (Janbjan)-a Universitato eldonis "Manlibro de Ĉina-Esperanta Konversacio kaj Leksikono", kiu estas kompilita de Yu Dequan (Ju Deĉjŭan). La Ĉina Xueyuan (Ŝjuejŭan)-a Eldonejo eldonis "Esperantan Konversacion" kompilitan de Lü Chuan (Lju Ĉuan).

● Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, belga peranto de El Popola Ĉinio, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, Belgio ĝojas anonci, ke baldaŭ aperos nova bildstria albumo, kolorilustrita: Zamenhof Bildrakonte. La tekstoj estas de Tilleux Ghislaine kaj la desegnaĵoj de Disano Bruno. Temas pri la vivo de Zamenhof. La vendoprezo estas 290 BF. Mendu tuj! La ISBN n-ro estas 90-71652-15-7. Personoj, kiuj loĝas en la Eŭropa Ekonomia Komunumo, povas mendi ankaŭ ĉe oficialaj rekonitaj neesperantaj librovendejoj.

● La Litova Filio de la Asocio de la Sovetaj Esperantistoj organizis refondan kongreson de la Lito-

va Esperanto-Asocio, kiu okazis la 10-an de decembro 1988 en Kaŭnas. Ĝin partoprenis delegitoj de ĉiuj litovaj E-kluboj kaj la gastoj el Moskvo, Blankrusio, Estonio, Latvio, kaj ankaŭ el Pollando kaj Svislando.

● En julio ĉi-jara la Vaska Registaro ebligas Esperantigon de la vidbendo "Vivi en Eŭskadi". Tiu ĉi 25-minuta propaganda vidbendo estas senpage havebla ĉe la Vaska Registaro post peto al nia E-rondo. Sed atentu: nur landaj asocioj aŭ gravaj E-organizaĵoj rajtu peti ĝin. Oni devas indiki preferatan sistemon (VHS aŭ BETA). Petojn direktu al Grupo Esperantista de Bilbao. Barrenoalle Barrena, 7-1, E-48005 BILBAO, Hispanio.

● Inter la 17-a kaj la 22-a de julio, 1989, okazos en la urbo Bilbao la 49-a Hispana Kongreso de Esperanto, al kiu eksterlandanoj rajtas aliĝi tute senpage.

● La 8-semajnaj Esperanto-kursoj en la Popola Altlernejo en Karlskoga de Svedio sukcese daŭras. La 21-an de aŭgusto 1989 komenciĝos E-kurso por komencantoj; la 13-an de marto kaj la 16-an de oktobro okazis kaj okazos E-kursoj por progresantoj. Vere bonvenaj estas ankaŭ eksterlandanoj. Krom Esperanto oni povas elekti aliajn temojn de studo, ekz., ceramikon, muzikon, bazan komputadon ktp. Por pliaj informoj skribu al: Karlskoga folkhögskola, 691 24 Karlskoga, Svedio. Tel. 0586 - 503 60. ■

Esperanto-monumento sur la insulo Vlieland, Nederlando


Gvidanto de la Kultura Ministerio de Ĉinio donas premion al Honfan (dekstre).



Gaja Kateto

Grizulo estas nomo de gaja kateto. Ĝi naskiĝis en gaja printempo.

La nove naskita Grizulo estis



plene kovrita de mallongaj grizharoj. Ĝi estis ne tiel bela, kiel ĝiaj du fratinoj. Pro tio mia filino nomas ĝin Grizulo.

Tamen post unu monato Grizulo fariĝis tre bela. Belaj haroj aperis sur ĝia tuta korpo: Sur ĝiaj kapo kaj dorso argentaj haroj, sur la brusto la helgrizaj kaj sur la kvar membroj la blankaj kaj grizaj. La blankaj haroj vigligas ĝiajn lipojn kaj okulojn. Ĝi estas vere aminda!

Inter la tri katetoj Grizulo la unua ellernis mem preni manĝaĵon. Post la manĝado, imite sian patrinon, ĝi purigis la vizaĝon per siaj ungoj. Kiam ĝi vidis nekona-

ton, ĝi ekmiaŭis.

Oni ne scias, kiam Grizulo ekhavis la kutimon dormeti ĉiuvespere sur mia gambo kun la kapo sur mia brako. Por mi ĝia ronkado estas bela, kvazaŭ serenado.

Estis tempo por sendi la katetojn al alia. Tion mi promesis jam antaŭ ilia naskiĝo.

Du katetoj jam foriris antaŭ kelkaj tagoj kaj nin devis adiaŭi ankaŭ Grizulo... Kvankam ĝi estis portita malproksimen, ni tamen ankoraŭ aŭdis

ĝian krion.

Ĉe la vespermanĝo mia filino diris nenion. Pro foresto de Grizulo ankaŭ mi estis negaja.

La patrino-katino miaŭis la tutan nokton pro la foriro de la lasta filino.

En la sekvanta mateno mia filino diris: "Panjo, mi vidis Grizulon en la sonĝo. Ĝiaj grandaj okuloj estis plenaj je larmoj. Ni reprenu ĝin morgaŭ. Ĉu bone?"

Do, por konsoli la patrinon kaj mian filinon mi reprenis ĝin, kiun mi jam donacis al alia. Tio estis la unua fojo por mi en la vivo. ■

Tarifo: unu internacia respondkupon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Ekspozicion ni planas dum la Hispana Kongreso de Esperanto julie. Ni bezonas kaj tre dankas ricevi ĉiuspecajn Esperantajn afiŝojn, propagandilojn (en kaj pri E-o), turismajn broŝurojn Esp-ektp. Grupo Esperantista, Barrenkale Barrena 7-1^a 48005-Bilbao, Hispanio.

* 28-j. Komputisto dez. kor. tm. kaj kontakti kun fakulo kaj institucio pri Esperantologio, interlingvistiko kaj perkomputila tradukado kaj interŝ. fakverkojn de menciitaj kampoj kaj E-naciajn vortarojn. Adr.: S-ro Liu Haitao, Dianjie Jisuanji Zhan, Qinghai Lu Chang, Datong, Qinghai, CN-810108, Ĉinio.

* Cao Xionglin dez. interŝ. Esperantajn pm., kaj aliajn poŝtaĵojn. Adr.: Ruzilu 25 hao, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio.

* Wang Hong kaj liaj geamikoj (24-38 j.) dez. kor. tm., kaj interŝ. pm., bk., kaj librojn. Cetere respondos. Adr.: Hunan Xinhua Yinchua Yichang, Changsha, Hunan, Ĉinio.

* S-ro Ge Haiyun, 20-j. instruisto, dez. kor. pri ĉt., kaj interŝ. pejzaĝajn fotojn, pm. kaj kolektas alilandajn E-eldonaĵojn. Adr.: Minle Xuexiao, Guomeng, Yancheng, Jiangsu, Ĉinio.

* S-ino Magdalena Csige, 35-j. instruistino, interesigas pri libroj, muziko, vojaĝo, teatro, filmoj kaj korespondado. Adr.: 4281 Letavertes, pf. 7, Hungario.

● Ĝis nun, oni trovis en Ĉinio 148 specojn da mineraloj, kies la-tenta valoro okupas la trian lokon en la mondo. Ĉinio ĉiujare elfosas pli ol 1.7 miliardojn da tunoj da ercoj, 40-oble pli multe ol tiuj antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio.

● La valoro de la ĉinaj eksportitaj malpez-industriaj produktaĵoj en 1988 superis 10 miliardojn da usonaj dolaroj kaj konsistigis 1/3 de tiu de la tuta lando.

● Ĝis la lasta jarfino la nombro de la malfermitaj havenoj de Ĉinio jam atingis 413. Ĝia martransporta flotaro okupas la 8-an lokon en la mondo, sed antaŭ 10 jaroj ĝi okupis la 12-an.

● Lastjare Ĉinio produktis 10.4 milionojn da tunoj da marproduktaĵoj kaj per tio fariĝis la tria lando en la mondo, kies jara kvanto de marproduktaĵoj superis 10 milionojn da tunoj.

● Sistema simulado estas sinteza altteknika analogio. Depost 1979 Ĉinio esploris lakt-vojan entjeran simul-komputilon, analogian sistemon de transporta raketo kaj aliajn fizikajn simulajn sistemojn.

La nivelo kaj skalo de la esplorado okupas la trian lokon en la mondo, nur post Usono kaj Britio.

● En 1954 Ĉinio komencis liveri al aliaj landoj kompletigitajn instalaĵojn. Ĝis nun, ĝi jam helpis 88 landojn per 1 233 konstruaĵoj, agrikulturaj, brutobredaj, fiŝkaptaj, malpez-industriaj, maŝinfabrikaj, trafikaj, higienaj, sportaj k.a.

● Ekde la 1-a de marto de la kuranta jaro, la entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj en Ĉinio povas bilanci konton per Renminbi (ĉina mono) aŭ per alilanda mono.

● Kun la Universala Elektra Kompanio de FR. Germanio kiel peranto, la Germana-Ŝanhaja Subfervoja Kliko konstruos subfervojn en Ŝanhajo. La kontrakto por la konstruado de la unua periodo estas ellaborita.

● La jara produktokvanto de kulturitaj manĝeblaj fungoj en Ĉinio atingis 600 mil tunojn kaj okupas la unuan lokon en la mondo. Lastjare Ĉinio eksportis 200 mil tunojn da giromitroj.

● La unua ĉina provtuba ŝafido 5.3 kg. peza naskiĝis lastatempe en la Eksperimenta Bestoesplora Centro de la Universitato de Interna Mongolio, Ĉinio.

● La nombro de la ĉinaj kristanoj atingis 4 milionojn, je miliono pli multe ol tiu en 1982.


● Februare ĉi-jare ĉina baritonulo Cao Qun (Caŭ Ĉjun) gajnis "Stevens-premion" en la muzika festivalo de Ballymena okazinta en Britio.

● Ĉina halterlevisto Liu Shoubin (Liŭ Ŝoubin) rompis la mondan ŝirlevan rekordon de kategorio de 56 kg. per 134.5 kg. en la Internacia Amikec-pokala Halterleva Turniro okazigita la 1-an de marto en Sovetunio.

● Post kiam la ĉina filmo "Ruĝa Sorĝo" gajnis la premion "Ora Urso" en la 38-a Internacia Filmofestivalo de Okcidenta Berlino, alia ĉina rakontfilmo "Vespera Sonorado" gajnis la specialan premion donitan de la juĝkomitato, la duan gravan post la premio "Ora Urso", en la 39-a Internacia Filmofestivalo de Okcidenta Berlino, fe-



Bazaro de giromitroj



En Yingkou-haveno, la dua komercnaveno en la Nordoriento de Ĉinio



Usonaj gastoj aĉetas tapiŝojn de Tianjin.



"Vespera Sonorado" en filmado


bruare de la kuranta jaro. La filmo rakontas pri la renkontiĝo inter ĉinaj popolaj armeanoj kaj ĉ. 30 japanaj venkitaj soldatoj sur batal-kampo kun multaj kadavroj, tuj post la finiĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

● La ĉina klasika romano "Jin-Ping-Mei", plurfoje malpermesita,

aperis antaŭ nelonge kiel la 5-a oficiala eldono de la nova Ĉinio, laŭ la plej frua originalo de la verko, kiu estas la plej bone konservita kaj plej kompleta de Ĉinio.

● Antaŭ nelonge ĉinaj kaj francaj sciencistoj trovis "subteran mondon" abundan je riveroj kaj

kuriozaj grotoj interligiĝintaj ĉe Luodian (Lüodjan)-gubernio, Guizhou (Gujǒu)-provinco, Ĉinio. La baseno de la subteraj riveroj estas ĉ. 2 000 kvadrataj km. Fakuloj opinias, ke la loko povas servi kiel turisma pitoreskejo, kaj ankaŭ por grot-esplorado. ■



Riĉa rikolto de salikokoj breditaj en malprofundaĵo

Dancoj de nacimalplimultoj en Yunnan

Teksto de LI QIANG
Fotoj de HAIFENG



YUNNAN-PROVINCO en la sudokcidenta parto de Ĉinio, kun belaj pejzaĝoj, favora klimato, abundaj kreskaĵoj kaj apartaj naciaj moroj, sin trovas sur bela kaj mistera fekunda altebenaĵo. Tie vivas 24 nacimalplimultoj. Mi vivis en Yunnan 9 jarojn kaj tie pasigis la plej belan tempon de mia vivo. Mi forlasis la lokon antaŭ dek jaroj, tamen mi ankoraŭ sopiras al la tiama vivo. En la infaneco mi ne emis danci, ĉar al mi mankas talento por dancado. Tamen, la nacimalplimultoj de Yunnan profunde infektis min per siaj dancoj, originaj kaj ardaj.

En forta kaj ritma tamburado vaaj knabinoj ekdancis laŭ la takto, sin fleksante jen antaŭen, jen malantaŭen, ilia longa hararo ĵetigis jen antaŭen jen malantaŭen, jen dekstren jen maldekstren, kvaŝaŭ flirtanta rubando. La kruda kaj bela lignotambura danco kvaŝaŭ portus min al malproksima mondo: la ĉielskrapanta primitiva arbaro sur la monto Awa, la primitiva triba vivo finiĝinta antaŭ dekoj da jaroj, la primitiva religia kredo... Hodiaŭ la lignotambura danco restas sama kiel en la antik-



Tambura danco de vaoj



Pavo-danco de tajoj

"Danco por Luno" de jioj



Danco de blangoj





Danco "Munaozongge" de ĝingpooj

veco, tamen ĝi ne plu temas pri la primitiva kulta aktivado. La malnovaj barbaraj kaj superstiĉaj moroj jam nulĝis. En celebrado de riĉa rikolto kaj festoj, la vaĵoj ĉiam frapas lignan tamburon kaj dancas per fortaj kaj belaj paŝoj, por esprimi sian bravan kaj obstinan batal-spiriton.

Munaoshidong el kvar fostoj rememorigis al mi pri Munaozongge-festivalo en la montvilaĝo de ĝingpooj. Munaozongge en la ĝingpoa lingvo signifas kolektivitan dancon. Ĝingpooj en festaj kostumoj kolektiĝis antaŭ la fostoj. Du altprestiaĝaj maljunuloj gvidis la dancon de la festivalo. Kun bela ĉapo ornamita per pavaj plumoj ili ludadis brilantan longan glavon, dum la aliaj akompanate de la muziko dancis antaŭen en longa vico. La junuloj, portante blankan turbanon sur la kapo kun ruĝaj kvastoj, ritme svingis la longan glavon por montri sian kuraĝon, neflekseblecon kaj virecon. La knabinoj kun brilantaj arĝentaj ornamaĵoj bele dancis kun tuketo streĉita de ambaŭ manoj, senĉese svingante la supran korpoparton. La glavoj kaj arĝentaj ornamaĵoj brilegis en la sunlumoj, la ruĝaj kvastoj kaj belaj jupoj flirtetis en venteto kaj la arĝentaĵoj tintis or-

elplaĉe je la interfrapiĝo. La gejunuloj ĝojkriis "oje, oje..."

Mi iam vizitis la aŭtonomajn subprovincojn Xishuangbanna kaj Dehong, kie ĉefe loĝas tajoj. Iliaj graciaj kaj delikataj dancoj kvazaŭ kondukus min en artan galerion. La tajaj knabinoj, pave alivestitaj, kune kun junuloj vigle dancis laŭ la takto de tamburo kaj gongo, imitante la movojn de pavo pri flugado sur la ĉielo, promenado sur herbejo, trinkado ĉe la fonto kaj disetendo de la vosto. La tajoj rigardas pavon kiel simbolon de bonaŭguro, feliĉo, paco, libero, bonkoreco kaj belo, tial ili ŝatas pavodancon. Ili estas lertaj en observado kaj imitado de bestaj movoj kaj kreis belajn birdo-dancon, kormorano-dancon, elefanto-dancon kaj cervo-dancon.

La tambura danco de tajoj estas neforgesebla. Lertaj ludantoj tamburas ne nur per siaj polmo, fingroj, mandorso, pugno, sed ankaŭ per siaj kubuto, genuo kaj kalkano. Ili tamburas dancante. Ili frapas malsamajn partojn de la tamburo, peze aŭ malpeze, rapide aŭ malrapide, tiel ke la bruado fariĝas jen laŭta jen mallaŭta, kunfandiĝante kun la facilaj kaj ŝanĝiĝemaj paŝoj.

La ĵiaj gejunuloj en festaj kostumoj sin formis en grandan cirklon dutavolan. La junuloj ludis trikordan muzikilon aŭ fluton. Akompanate de la muziko ili gaje dancis. La knabinoj dancis manfrapante por pligajigi la atmosferon. Tio estas la plej ŝatata danco de la ĵioj loĝantaj en la meza parto de Yunnan. Ili ofte dancadis de la lunleviĝo ĝis la lunsuĉiro, tial la danco estas nomata "Danco por Luno". Dum la dancado la gejunuloj montras sian amon unu al alia. En la alta tajdo de la gaja kaj arda dancado la gejunuloj levis sian maldekstran piedon kaj kroĉis ĝin al tiu de sia partnero, kriante "jou, jou...". Infektite de la gaja etoso ankaŭ la apudstarantoj partoprenis en la dancado, kaj tiel la dancantoj fariĝis pli kaj pli multaj.

Mi ĝuis ankaŭ la tamburan dancon kun nacimalplimultaj trajtoj prezentitan de jeĉejoj de hania nacio. En bruado de bovleđa tamburo kaj gongo, belaj knabinoj ekdancis. Ili dancis en nigra bluzo kaj pantaloneto, kun blanka triangula ĉapo sur la kapo, kun zono ornamita per arĝentaj bidoj, ĉeneroj kaj tintiletoj ĉe la talio, getaĵoj kun lignaj tintiletoj sur la piedoj kaj sunombrelo en la mano. La bruado de la getaĵoj, tintiletoj, arĝentaj ornamaĵoj, tamburo kaj gongo harmoniis kun la ĝoja krio. Vere ebriiga sceno!

La primioj vivas ĉe la nordokcidenta altebenaĵo de Yunnan-provinco. Ili dancejo povas esti malgranda parcelo da gazono aŭ kompare ebena montodeklivo. Laŭ takta kaj ĉarma melodio de fluto dekoj kaj eĉ centoj da primioj mano en mano gracie ekdancis. Laŭ la muziko iliaj danĉpaŝoj fariĝis pli kaj pli patosaj kaj fortaj, kio plene manifestis fervoron, kuraĝon kaj optimismon de la primioj.

La nacimalplimultoĵ en Yunnan-provinco ĉiu havas sian propran dancon, kiu profunde gravuriĝis en mia memoro. ■

Rezulto de la Konkurso de EPC-amikoj

La nomita konkurso vekis grandan intereson ĉe niaj legantoj. Ĝis la 15-a de marto 1989 ni ricevis 547 validajn respondpapirojn el 35 landoj krom Ĉinio, inter kiuj 98

venis el Jugoslavio. Ĝi estas la lando kun plej multaj konkursantoj tiurilate. El la konkursantoj 141, inkl. 28 el Sovetunio, gajnis 95 poentojn (la plej alta poentaro),

299 gajnis 80-90 poentojn kaj 72 gajnis 60-75 poentojn. Sovetunio estas la lando kun plej multaj ricevintoj de la plej alta poentaro.

Laŭ la difino 4 el ili ricevis la unuan premion, 8 la duan premion kaj 30 la trian premion. Ili estas elektitaj lote de la redakcio de EPC el la 141 gajnintoj de la plej alta poentaro. La 22-an de marto okazis en la redakcio la lotumado. Invitite, angla samideano s-ro Ian Jackson, eksprezidanto de TEJO, kaj s-ro Yukio Izumi, iama redaktoro de La Revuo Orienta de Japanio, kiuj laboras en Pekino, lotumis la premiojn kaj deklaris la gajnintojn de la unua, dua kaj tria premioj (Bv. legi la nomliston). La ceremonion ĉeestis ankaŭ samideanoj de ĈEL kaj esperantaj sekcioj de Radio Pekino kaj la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio.



S-ro Ian Jackson (la tria de dekstre) kaj s-ro Yukio Izumi (la dua de dekstre) antaŭ lotumado

Lotumado



La gajnintoj de la unua premio ricevis ĉin-stilan murtapiŝon kun broditaj grandaj pandoj sur ĝi; la gajnintoj de la dua premio ĉinan silkan brokaton kun figuroj de galopantaj ĉevaloj kaj la gajnintoj de la tria premio ĉinajn Esperantajn librojn "5000 Jaroj de Ĉinio" kaj "Bukedo al Vi". Tiuj, kiuj gajnis la plej altan poentaron kaj ne estis premiitaj, senpage ricevis la Esperantan libron "40 Vidindaj Lokoj de Ĉinio".

Pro nia malatento niaj tri solvoj por la 11-a demando de la testo estas ne ĝustaj. Pardonon ni petas. Ni forstrekis ĝin el la demandaro kaj pro tio ĉi-foje la plej alta poentaro estis 95.

Estas menciinde, ke 90 konkursantoj donis ĝustan solvon al la


11-a demando, el kio vidiĝas ke ili estas seriozaj kaj multsciaj. Ni donacis "40 Vidindaj Lokoĵ de Ĉinio" ankaŭ al tiuj, kiuj gajnis 90 poentojn kaj donis ĝustan solvon al la 11-a demando de la testo.

Memore al la aktivado, ni sendis unu Esperantan filatelan tutajon al ĉiu konkurstanto.


La konkurso ne nur firmigis la amikecon inter ni kaj niaj legantoj, sed ankaŭ pliiĝis ilian konadon pri Ĉinio. Estonte, se eble, ni okazigos similan konkurson esperante, ke pli multaj samideanoj ĝin partoprenos.

— La Red.

(Vd. Solvoj por konkurso de EPĈ sur p. 32)




La unua premio



La tria premio

La dua premio





Originala Muzeo

Teksto de WEI NA
Fotografio de WEI NA

TIO estas originala muzeo.

Ĝi prezentas 22 tipajn ĉinajn antikvajn maŭzoleojn de Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) ĝis la Norda Song-dinastio (960-1127). Tiujn maŭzoleojn oni translokis el diversaj lokoj kaj reaperigis ilin en ilia originala formo. Jen la Luoyang-a Muzeo de Antikvaj Maŭzoleoj kun scienco kaj arto en kombino. Ĝi situas en Mangshan-monto en la norda antaŭurbo de Luoyang, Henan-provinco, kaj kovras tri hektarojn, kun plank-areo de 7600 kvadrataj metroj.

La muzeo dividiĝas en du partojn, surteran kaj subteran. La surtera konsistas el la antaŭa kaj malantaŭa partoj. En la antaŭa parto estas marmoraj turoj, haloj, akcesoraj domoj kaj supraĵoj kaj malsupraĵoj salonoj interligitaj per koridoroj. La ĉefaj konstruaĵoj de la malantaŭa parto estas kvar-angula

turo kaj belvida kiosko. En la subtera parto troviĝas salono de la Okcidenta kaj Orienta Han-dinastioj, salono de Wei(Ŭej)-kaj Jin(Ĝin)-dinastioj, salono de

Tang- kaj Song-dinastioj kaj ripozsalono interligitaj per galerioj, ambaŭflanke de kiuj kuŝas la 22 maŭzoleoj.

Tie estas dek maŭzoleoj de

La fresko "Ĉeval-raĵdo" (parto) en la maŭzoleo de la Orienta Han-dinastio



Han-dinastio masonitaj el ŝtonoj aŭ brikoj. Ĉar en Han-dinastio oni donis grandan atenton al enterigo, oni konstruis en maŭzoleo multajn ĉambrojn kvazaŭ por vivantoj. Iuj maŭzoleoj konsistas el la antaŭa kaj malantaŭa ĉambroj. La malantaŭa tenas ĉerkojn de la gemastroj kaj la antaŭa tiujn de iliaj infanoj. La ĉerkojn ĉirkaŭas trinkiloj, manĝujoj, akvujoj, vinujoj, argilaj puto, kuirforno, grentenejo, porkejo, porkoj, kokoj kaj hundoj kaj ankaŭ jungilaro, moneroj, tegoloj, lakaĵoj k.a.


La plej gustoplenaj en la dek maŭzoleoj estas diversaj freskoj kaj pentraĵoj sur brikoj. Kvankam ili odoras superstiĉe, tamen montras la vivoplenan socion de Han-dinastio. Kvankam ili temis pri fantomoj, tamen impresas ne melankolie, nek terure. Kvankam ili konigas abstraktan enhavon apartan de la reala vivo aŭ vidigas scenojn de ekskurso kaj festeno, tamen donas belan melodion kaj

fortan movadon.

Pro uzado de malplenaj brikoj aperis maŭzoleoj el bildo-brikoj. Krom ornamaj desegnoj estas ankaŭ bildoj pri akcepto kaj vizito de gastoj, ĉasado kaj rajdado fare de tombomastro kaj pri mitologiaj rakontoj. Ili estis faritaj per muldilo dum farado de adoboj kaj ricevis kolorojn post la kompletigo de maŭzoleo. La ĉarmaj bildoj spegulas la socian vivon de la popolo de Han-dinastio, ilian idealon kaj estetikan senton. Ili montras ankaŭ la trajtojn de tiu periodo.

Estas kvin maŭzoleoj de la periodo de la 3-a ĝis la 6-a jc. La epitafo de unu el ili, la maŭzoleo de markizo Pei Qi (Pej Ĉji), indikas, ke en la malantaŭa ĉambro kuŝas lia patrino, en la orienta kaj okcidenta ĉambroj li kaj lia edzino, kaj en la flanka ĉambro lia filino. La kvar personoj estis kune enterigitaj, ĉar ili samtempe mortis en milito.

Ceremoniaj argilaĵoj elterigitaj el la maŭzoleo de Yuan Shao de la Norda Wei-dinastio (386-534)



Iu brika maŭzoleo konstruita en 247 konsistas el ĉefkoridoro, antaŭa koridoro, salono, flankaj malantaŭa koridoro kaj malantaŭa ĉambro. La maŭzoleo simetrie aranĝita ambaŭflanke de la akso sentigas konvenecon, kompakton kaj harmonion. La loĝejoj de la tiutempaj nobeloj estis probable same aranĝitaj.

La kunentombigaĵoj en du maŭzoleoj de Tang-dinastio (618-907) estas tre valoraj. El ili plej okulfrapas trikoloraj ceramikaĵoj de tiu dinastio. En la dinastio furoris grandioza enterigo. Iuj homoj ne domagis monon, eĉ forvendis siajn tutajn havaĵojn por daŭregi "luksan vivon" post la morto. Ili faris kiel kunentombigaĵojn trikolorajn ceramikaĵojn en formo de gardisto, kantistino, dancistino, edzino, servistino, ĉevalo, bovo, kamelo, birdo, besto, vazo, telero, bovlo kaj poto, kiujn ili posedis dum la vivo. La metiartistoj atingis mirindajn sukcesojn en plastiko, garnado, glazurado kaj bakado de tiuj ceramikaĵoj kaj kreis originalan stilon, belan kaj elegantan. La objektoj povas esti rigardataj kiel raraj inter la ĉinaj antikvaj metiartaĵoj.

En la muzeo vidiĝas kvin maŭzoleoj de Song-dinastio konstruitaj el brikoj, kvazaŭ el ligno. Estas tre belaj la maŭzoleoj kun traboj bele gravuritaj kaj pentritaj kaj muroj portantaj gravuritajn florojn kaj homfigurojn. La maŭzoleo de Song-dinastio n-ro 4 aspektas kiel ok-angula kiosko. Ĝia artisma projektado kaj delikata gravurado plene montras la saĝon de la tiamaj arkitektoj kaj metiartistoj.

En akcesoraj domoj de la muzeo estas eksponataj modeloj de tipaj maŭzoleoj de la primitiva kaj sklava socioj, ĉerkoj de diversaj dinastioj kaj malsamaj funebraj ceremonioj. La muzeo prezentas la evoluon de la enterigo de la nomitaj dinastioj kaj la enterigan tradicion de la antikva Ĉinio, tial ĝi altiras al si pli kaj pli da fakuloj kaj turistoj. ■

PENG ZHENGYANG:

Puyang, Nova Petrola Urbo

PUYANG, kiun oni rigardis malriĉa kaj postĝinta loko, leviĝis antaŭ kelkaj jaroj kiel nova petrola urbo sur vasta dezerta tero.

La urbo Puyang en nordorienta Henan-provinco ampleksas kvin guberniojn kaj unu distrikton, kun 2.8 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 300 000 urbanoj. En 1979 la Centra-ebenaĵa Petrolkampo, la kvara granda en Ĉinio, komencis esti ekspluatata en Puyang. Tio donis al Puyang grandan ekonomian forton, ke ĝi iom post iom eliris el la malriĉeco.

La nomita petrolkampo kovras areon de ĉ. 43 000 kvadrataj kilometroj, kun abundo da nafto kaj




En la komputilejo de la Puto-mezura Kompanio

Foto de BIAN HENGQUAN

La Dua Gas-traktejo kun ekipaĵoj faritaj de Ĉinio

Foto de WANG JIANMIN





La petrolkampo en vespero

Foto de ZHANG CHANGJIANG






Puyang Foto de ZHANG CHANGJIANG

natura gaso. La jam Trovita rezervokvanto de nafto estas 620 milionoj da tunoj kaj tiu de natura gaso — 37.28 miliardoj da kubmetroj.

La stratomoj de la petrolkampo estas malfacile foseblaj pro sia komplikeco, tamen en la lastaj dek jaroj oni importis avangardajn teknologiojn kaj ekipaĵojn per kapitalo plurkanale akirita kaj plioftigis teknikan interŝanĝon kun aliaj petrolkompanioj de Ĉinio kaj aliaj landoj, tiel ke senĉese kreskis nafto-produktado, ekz., la petrolkampo produktis 7.2 milionojn da tunoj da nafto en 1988. Samtempe, ĝi donis al Puyang ekonomian kaj teknikan helpon kaj per tio akcelis



En oleo-stacio Foto de WANG JIANMIN



Parko en petrolista loĝkvartalo Foto de WANG HUAIXIN

ĝian industrian kaj agrikulturan produktadon kaj ĝian urbo-konstruadon.

La Ĝenerala Centra-ebenaĵa Petrolkemia Korporacio fondita en 1987 nun planas konstrui kemisterkan fabrikan, kiu produktos ĉiujare 300 000 tunojn da sinteza amoniako kaj 520 000 tunojn da ureo, kaj fabrikan, kiu produktos

ĉiujare 140 000 tunojn da etileno. Laŭ takso, post la fondiĝo de la du fabrikoj ilia jara produktovaloro atingos 1.27 miliardojn da juanoj.

Hodiaŭ la Centra-ebenaĵa Petrolkampo kun pli ol 70 000 laboristoj kaj oficistoj jam fariĝis granda produktejo de nafto kaj natura gaso, kun kompletigitaj labor- kaj viv-instalaĵoj. ■



D-ro Qiu Hong

ZHANG QINGZHEN:

Terapio de Aŭriklaku- punktura Pinĉado Ser- vas al Mal- sanuloj

KIAM mi faris intervjuon en Yangzhou (Jangĝoŭ), mi konatiĝis kun Wang Huiqin (Ŭang Hujĉin), vicprezidanto de la Yangzhou-a Esperanto-Asocio. Ŝi, 46-jara, radibrila kaj energiplena, aspektas multe pli juna ol fakte ŝi estas. Mi demandis, kiel ŝi gardas sian sanon. Ŝi respondis ridete: “Eble vi ne kredus, ke antaŭ kelkaj jaroj mi perdis laborkapablon pro malsano. Estis d-ro Qiu Hong (Ĉiu Hong), kiu resanigis min per aŭriklakupunktura pinĉileto.”

Mi estis iom duba pri tio kaj decidis viziti la d-ron por propraokule koni lian kuracadon.

Qiu Hong estas akupunkturisto de la Subei-a Popola Hospitalo. Li laboras kiel kuracisto jam 40 jarojn. Kiam mi eniris lian kuracajn ĉambron, mi vidis knabon kuracata. La paciento estas mezlernejano kaj nomata Hu Xiaobo (Hu Ŝjaŭbo). D-ro Qiu diris, ke la knabo suferas de optiknerva atrofio. Aŭriklado de Hu Xiaobo estis pinĉita per 6 pinĉiletoj, 2 el kiuj estis kunligitaj per konduktilo kun duonkonduktanta aparato. Konvena kurento povas altigi la kuracajn efi-

kon. “Ĉu ili doloras vin?” mi demandis. Li kapneis. “Ĉu la kuracado efikas?” “Antaŭe la vidpovo de miaj okuloj estis 0.08, estis malfacile legi. Post 3-monata kuracado mia vidpovo fundamente normaligis. Nun mi daŭre akceptas la kuracadon por atingi la bonan vidpovon de 1.5,” li respondis.

Mi miris, ke tiel magian forton havas la malgrandaj aŭriklakupunkturaj pinĉiletoj! Informiĝinte, ke mi suferas sendormon, d-ro Qiu pinĉis mian aŭriklon per pinĉiletoj. Post konektado, mi sentis pikadon ĉe la orelo. Sed tio ne malhelpis min noti, nia interparolo daŭris.

D-ro Qiu diris, ke sur la homa aŭriklado estas ĉ. 300 akupunkturaj punktoj strikte rilataj al la *ĝingluo*-kanaletoj en la homa korpo. Sur tiuj punktoj oni povas diagnozi kaj kuraci malsanojn. Helpate de duonkonduktantaj aparatoj por diagnozado, kuracado kaj anestezado ĉe aŭriklaj akupunkturaj punktoj, oni akiris bonan klinikan efikon.

“La terapioj de aŭriklaj akupunkturaj punktoj estas akupunk-

turo, aŭriklapunkta premo kaj hidroakupunkturo, sed ĉiu havas sian mankon. En 1971 mi provfaris aŭriklakupunkturajn pinĉiletojn por anstataŭi la akupunkturajn pinglon, por kuracado helpata de duonkonduktanta kuraca aparato. Dum la pasintaj 17 jaroj mi kuracis 200 000 pacientojn de pli ol 100 malsanoj, neniu el ili estis infektita kaj la kuracefiko rimarkinda.”

D-ro Qiu prezentis al mi stakon da kuracaj registroj kaj leteroj de resanigitoj. Laboristo Che Yongming skribis: “Kiam mia filo estis 6-jara, li suferis de alta febro kaŭzita de encefalito-B kaj troviĝis en komato. Por savi lin, d-ro Qiu kuracis lin per aŭriklakupunktura pinĉileto. Post kelkaj tagoj normaligis lia temperaturo kaj li ekhavis apetiton. Post 2-monata kuracado plene resaniĝis mia filo.”

Maljunulo Li faris jenan skribon: “Mi suferis de stomaka malsano jam pli ol dek jarojn. Ĉiutage mi prenis medikamenton, sed tio ne povis kuraci mian malsanon kaj ĝi eĉ serioziĝis. Mi vomis ĉion kion mi manĝis, mi nur povis manĝi likvan dieton. Mi malgrasiĝis ta-


gon post tago. D-ro Qiu diagnozis, ke min trafis hipertrofia gastrito. Post sinsekve 10-taga kuracado mi tute resaniĝis.”

Tiam d-ro Qiu elprenis kelkajn vitrajn skatoletojn ene kun ŝtonaj grajnoj, kiuj estas litiazoj ekskrecitaj de malsanuloj. Li jam kolektis 800 skatoletojn da litiazoj, ĉiu kun la nomo de malsanulo. Paciento Jia Chuqing (Ĝja Ĉuĉing) longtempe suferis de gala litiazo, ĝi iam forte doloris lin seninterrompe kaj netolereble. Li informiĝis pri la bonefika terapio de d-ro Qiu kaj alvenis peti kuracon. Post 3-monata kuracado li ekskreciis multajn litiazojn, lia apetito kreskis evidente, kaj pliboniĝis ankaŭ lia longtempa sendormo.

Laboristo Li Guangfu suferis de naza polipo du jarojn. La iom post iom grandiganta polipo ŝtopis la naztruojn kaj malfaciligis la spiradon, manĝadon kaj dormon. Li venis al la hospitalo por peti de d-ro Qiu helpon. Post kvin-foja kuracado li spiris senbare. Post kuracado de 20 fojoj malaperis la polipo.

En la sekvinta tago post vizito al d-ro Qiu mi vizitis lian pacientinon Yu Yulin. Ŝi estis estrino de la Yangzhou-a Ĉinmedicina Hospitalo kaj nun laboras en la urba administrejo de emeritoj. Kiam mi eniris en ŝian oficĉambron, mi vidis ŝin en pentrado. Ŝi estis ĉ. 60-jara kaj vizaĝe radibrila kaj parolis humure. Ŝi diris al mi, ke antaŭ kelkaj jaroj ŝin atakis atria tremo. Ŝi estis ĉagrena, ripozis hejme kaj ofte vizitis hospitalon. Ŝi heziteme petis kuracadon de d-ro Qiu. Post unu jaro, ŝia malsano mildiĝis, ŝi ne plu anhelis dum surprizado de ŝtuparo kaj ekhavis apetiton. Poste ŝi revenis al la laborposteno.

“D-ro Qiu estas mia savinto kaj forigis la sterilecon de mia filino.” Ŝia filino Wang Xiaoling (Ŭang Ŝjaŭling) ne gravediĝis post edziniĝo de 4 jaroj. Komence de 1985 oni diagnozis, ke ŝi suferas de primara sterileco. Ŝi gravediĝis post kuracado de d-ro Qiu per aŭriklakupunktura pinĉileto. Unu monaton post ŝia gravediĝo ŝin minacis aborto. Por gardi la feton d-ro Qiu aplikis



D-ro Qiu kuracas per orelakupunkturaj pinĉiletoj.

al ŝi la terapion de aŭriklakupunktura pinĉado. En 1986 ŝi naskis bebon 3.2 kg. pezan.

Ekde 1985 d-ro Qiu kuracis 11 suferantojn de sterileco. 9 el ili gravediĝis post kuracado per la terapio kaj du ne trovis efikon.

Jam pasis 17 jaroj. Centmiloj da malsanuloj akceptis lian kuracadon kaj trovis bonan efikon. D-ro Qiu diris al mi, ke lia artikolo “La Farado kaj Klinika Aplikado de Aŭriklakupunktura Pinĉileto” vekis atenton de diversaj sanitaraj administracioj, post publikigo en la provinca ĉinmedicina revuo. La ŝtato, provinco kaj urbo subtenis lian laboron per monasigno. En novembro 1984 li invitite partoprenis en la Unua Tutlanda Kunveno pri Terapio de Aŭriklakupunktura Pinĉado kaj legis sian disertaĵon. En la pasintaj jaroj li ricevis subtenon kaj kuraĝigon de multaj kolegoj en- kaj eksterlandaj. Doktoro Li Yuanliang de la Usona Akupunktura Studcentro skribis al li: “Via kreaĵo aŭriklakupunktura pinĉileto estas oportuna delikataĵo. Jam delonge mi trovis la akupunkturajn pinĉojn malopor-

tuna en uzado. Mi tre admiras vian faron, ke vi detale publikigis la faradon kaj klinikan aplikadon de la aŭriklakupunktura pinĉileto.”

D-ro Qiu Hong ĉeestis la 2-an Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazigitan aŭguste de 1988 en Pekino. Lia parolado ĉe la medicina grupo vekis varman atenton. Iuj alilandaj ĉeestantoj tuj petis lian kuracadon, aliaj volis viziti lin. Li fariĝis plej okupita en la kunveno kaj eĉ ne havis tempon por manĝi.

Kvankam d-ro Qiu ne estas esperantisto, tamen li volas kontribui al la Esperanta afero. Precipe post la 2-a IAKSTE li estas inspirata de la internaciaj amikoj, kiuj interesiĝas pri lia terapio de aŭriklakupunktura pinĉado. Li komencis resumi sian klinikan praktikon kaj verkis instruan materialon kun 90000 ĉinaj ideogramoj. Li funkciigos internacian kurson pri la terapio de aŭriklakupunktura pinĉado. Li mem donos la lecionojn.

Li deziras, ke pli da personoj posedu la terapion, por ke ĝi pli vaste servu al la homaro. ■

LA DRINKEJO

“KLABO” (Novelo)

POR ŝpari groŝon, la mastro de la drinkejo de-nove varmigis vinon per kruda lignokarbo. La fumo saturis la ĉambron kaj tumultis sur la tabloj kiel ŝafgregoj. Chen Sanjiao (Ĉen Sangjaŭ) flaris la odoron kaj tuj perdis la intereson por drinki.

Antaŭ ol veni en la korton de la drinkejo, li jam flaris la odoraĉon. Li havis akran nazon. En sia juneco li povis koni laŭ la odoro de besta fekaĵo, kiam la besto trapasis la lokon.

En la korto estis dekelke da ĉevaloj kaj multe da homoj. Kelke da oroĉjunoj (unu el la nacimalplimulto de Ĉinio) estis ŝangantaj siajn felojn, astragalojn kaj fazanojn kontraŭ salo, pulvoro kaj faruno de Unuokululo de la butikoj Yuansheng. Ili bone sciis, ke ili multe perdos negocante kun li, sed ne volis iri 75 kilometrojn da vojo por vendi ilin al la ŝtata butikoj en Xiatus (Ŝjatus). Malsereniĝis okcidente la ĉielo. Baldaŭ la trafiko en la montaro estis blokota de neĝo. Antaŭ tio ili havis multajn aferojn por fari.

Irado de homoj faris neĝon koto, kies surfaco glaciigis kaj rebriletis. Unuokululo tenis abakon en mano kaj viŝis al si la blindan okulon per maniko. Li perdis okulon en batalo kun indiĝena ĉasisto por konkuri pri virino. Li ne sciis legi, nek uzi abakon, sed lia elokventeco mirigis la oroĉjunojn. Tamen Chen Sanjiao travidis, ke li ruzas por aĉeti iliajn zibelajn felojn je favora kosto. Sed li ne volis mal-kaŝi lian artifikon. Li devis zorgi siajn proprajn aferojn.

Kiam la sledo de Chen englitis en la korton, ĉiuj disiĝis cedante al li vojon kvazaŭ surprizitaj kapreoloj. Ili rigardis al li kun granda miro. Li sciis, kial ili miris. Ĉar li ankoraŭ vivis. Jes, certe ili tiel pensis.

Li deprenis de la sledo urson kun pezo de ĉirkaŭ 200 kilogramoj. Ĝia gorgo estis trapikita, ĝiaj intestoj pendis ekster la ventro kaj ĝiaj ĉurovoj estis rompitaĵoj.

“Ho, via moŝto, kontraŭ kio vi volas ŝanĝi?” komplete diris Unuokululo.

Chen Sanjiao eĉ ne rigardis al li kaj kaŭriĝis por maljungi la ĉevalon.

“Maksimume en tri tagoj la vojoj estos ŝtopitaj de neĝo, via moŝto. Kontraŭ kio ajn vi povas ŝanĝi vian urson.”

Chen Sanjiao ligis la ĉevalon al fosto kaj iris al la urso: “Kontraŭ via patrino mi ŝanĝos, vi bastardo! Venigu du homojn por enporti ĝin!”

Li ĉirkaŭprenis per rigardo la ĉeestantojn kvazaŭ stultulojn. Lia rigardo estis ankoraŭ tiom akra, kiel glavo. Kvankam li ne tre atentis famon, tamen li estis tre fama en la ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj lokanoj, eĉ ĉiuj hundoj timis lin. Li estis sentima, lerta en uzo de ponardo. Foje li mortigis lupon per tri piedbatoj kaj pro tio rompis al si la dikfingron de piedo. Neniu sciis precize, kiom li aĝas, ĉu li edziĝis, kiun virinon li iam amis, ĉu li estas hano aŭ dahuro. Li neniam ridis, aŭ, almenaŭ neniu vidis lian ridon, ŝajne li neniam ĝojis dum la vivo, eĉ dum drinkado.

Chen Sanjiao sidiĝis ĉe tablo tuj apud la fenestro. Li malfermis la fenestron, por ke la fumo eliru.

Klubo estis tranĉanta karotojn apud fajro. Ĉiufoje Chen Sanjiao petis grandan teleŝon da sukeritaj karotaj strioj.

“Vi ne aperis dum almenaŭ 3 aŭ 4 monatoj,” diris Klubo kun malgrandaj okuloj flagretantaj.

“Mi preskaŭ pereis,” diris Chen Sanjiao, delikate ŝirante bovaĵon en telero.

“Ĉu en Xinzi(Ŝinzi)-valo?”

“Tie mi iris pli ol unu monaton.”

“Vi piediris? Laŭdire lastmonate tie jam ekneĝis.”

“Mi ensipigis ĝuste en la neĝa tago ĉe pramejo de Humar-rivero. Ĉe Raozhu (Ĵaŭĝu) nin trafis ŝtormo, la ondoj leviĝis pli alte ol la velo. Ili levis la ŝipon kaj ĵetis ĝin kontraŭ la bordon. La ŝipo tute frakasiĝis.”

“Kien la homoj sur la ŝipo?”

“La ŝipmastro kaj lia tuta familio pereis. Lia plej juna infano estis apenaŭ unujara. La mastro mortis subite, kaj lia kadavro estas netrovebla. Li ŝuldis al mi 12 orajn gruzojn. Mi memoras.”

“Ŝuldo transmonda.”

“Mi ne esperis lian kvitiĝon. Mi nur volis, ke li memoru mian helpon al li en aĉeto de la ŝipo. Mi donis helpon al li nur konsiderante, ke li estas bravulo, novveninto...”

Klabo prezentis al li sukeritajn karotajn striojn. Ĉi tiu brue maĉis kiel bovo herbon. Kiam li estis englutanta vinon kaj karotajn striojn, lia adampomo moviĝis supren kaj malsupren kun bruo. Poste li insultis, ke la vino estas adulterita, la karoto ne dolĉa nek fragila.

Klabo silente aŭskultis humile. Sed liaj malgrandaj okuloj brilis blue, kaj liaj dentoj estis firme kunpremitaj. Li malamis Chen, ĉar en dekkelke da jaroj depost la malfermo de la drinkejo, Chen neniam pagis al li por sia manĝado kaj drinkado.

Chen ne levis la kapon, sed li povis diveni, kion pensis Klabo, kiu fiksis la rigardon sur li. Por li Klabo estis nur vundita lupo. Li tre ĝojis, ke li kreis la nomon Klabo. Apenaŭ tiu mikrookululo venis de fora loko, ili jam havis malamikan renkontiĝon. Chen baris al li la vojon per ĉevalo, turnadis ponardon en mano kaj englutis lin per rigardo kvazaŭ ĉasaĵon. “Ĉu vi venis ĉi tien post riĉiĝo?” Surprizita, li baldaŭ sin aplombigis: “Ne ŝovu vian nazon.” Sed Chen diris: “Vi ĵus venis al nia loko. Ĉiuj scias, ke mi estas entrudiĝema.” La mikrookululo diris kun fiksa rigardo sur la turnata ponardo: “Mi estas komercisto kaj venis por negoco.” Chen diris: “Vi ne povas trompi min. Mi jam flaris, ke vi murdis almenaŭ du homojn. Via korpo odoras per sango.” Je tio terurigis la mikrookululo: “For la kalumnion. Tio ne estas ŝerco.” Apenaŭ li finis la ekskuzon, lia ĉapo estis faligita de la ponardo, kaj Chen minacis lin per la ponardo direktita al lia gorgo: “Vi oldulaĉo, vi klabo. Se vi estas viro, estu singarda. Se vi kolerigos min, mi faros tranĉon ĉi tie por disigi vian kapon de via korpo.” Poste Chen neniam menciis la

okazaĵon, sed lia minaco kiel ŝtonego ĉiam premis la koron de Klabo.

Klabo intencis kvitigi lin. Li notis ĉiujn liajn ŝuldojn. Amikon oni devas karesi, sed kalkulon ne forgesi. Chen forestis dum la lastaj monatoj, kaj Klabo plendis al ĉiuj:

“Chen ŝuldas al mi monon, sed li silentis pri tio. Ĉu li povus esti kalkulata kiel viro?”

Nun la vorto estis atendanta en la gorgo, sed li baris ĝin.

Chen forte metis antaŭ lin la kupran vinkruĉon kaj diris:

“Plenigu la kruĉon.”

“Vi volas pli?”

“Ĉu vi timas, ke mi ne pagos?”

“Tia malgranda sumo ne indas vian mencion.”

“Mi ne damaĝos vin. Mi vivas honeste kaj ankaŭ mortos tiele.”

Klabo ridaĉis, plenigis la kruĉon kaj sidiĝis kontraŭe al Chen. Ĝuste en tiu momento li rimarkis, ke lavtuko plene ensorbinta sangon ĉirkaŭas la kolon de Chen kaj longa vundo etendiĝas malsupren. Sango eksudis el la vundo ĉe lia spirado. Klabo kaj surpriziĝis kaj ĝojis. Grava ne estas tio, kiu vundis lin, sed la fakto, ke li vundiĝis. Klabo pensis, ke li meritis la punon.

Li vidis, ke la laca mieno de Chen similas al brulinta ĉifono. Malgraŭ la vino lia vizaĝo malkaŝis, ke elĉerpiĝos lia vivo. Probable pro tio li profunde kovris per ĉapo la vizaĝon por kaŝi la vundon kaj la vizaĝon. Li volis restigi al la konatoj nur siajn fierindajn pasintaĵojn.

Jam ne longa tempo restis por lia vivo. Klabo subite pensis, ke li ne devas memori la ŝuldon kaj malami lin. Li ne sciis kion diri: ĉu konsolon aŭ insulton.

“Ĉu vi vidas ion en mia sino?”

“Kio? ...nenion mi vidis.”

Chen Sanjiao trinkadis vinon kun mallevitaj okuloj. Kvankam li ne rigardis al Klabo, tamen ĉi tiu ja sentis froston en la spino. Li respondis al Chen per tremanta voĉo. Li komprenis, ke Chen ne volis, ke li vidu lian vundon. Por sekretigi la aferon, tiu diablo ĉian kruelaĵon povos fari.

“Kredeble nun iuj havos temon por babilaĉado. Sed mi silentigos ilin.”

“Ĉu la vundo ne estas serioza?”

“Jes, almenaŭ mi estas viva.” Chen metis sur la tablon la ĉasistan ponardon, kiu pendis ĉe la kokso,

kaj diris al Klabo: “Alportu vian kontolibron.”

“Ne, via moŝto, mi ne intencas, ke vi nun kvitiĝu.”

“Sed vi memoru, kiuj ŝuldas al mi.” Kiam Klabo alportis kontolibron kaj skribilaron, Chen etendis sian manon en la sinon kaj ekgratis la jukantan vundon. Poste li lante diris kun fermitaj okuloj: “Cikatra Okulo Zhang (Ĝang) ŝuldas al mi 20 orajn gruzojn; Zhang Zhao (Ĝang Ĝaŭ) ŝuldas kvindek kilogramojn da tritiko kaj kvar orajn gruzojn; la Sesa Sinjoro de Lu-familio ŝuldas kvar ursopiedojn kaj 10 orajn gruzojn; Barbulo Liu ŝuldas 6 ĉevalojn...”

“Ĉu estas ĉio?” demandis Klabo post registro.

“Jes,” Chen Sanjiao eltrinkis la vinon en la bovlo.

“Ĉu vi intencas kvitiĝi per tio?”

“Mi nur volas, ke ili memoru siajn ŝuldojn. Ili ne faru malbonaĵojn poste. Wang Fengxiong (Ŭang Fengŝjong) mortis. Ili estis triopo, sed mi sola. Ili multe malfeliĉigis la vidvinon Zhang (Ĝang). Ili meritas. Ili renkontis min ĉe la pramejo Naren (Naĵen) kaj li mem frapiĝis kontraŭ mian glavon.”

“Jes, ili meritas.”

“La urso estas ilia ĉasaĵo. Wang Fengxiong estis lerta pafisto, sed estis venkita de mi. Li faris tro multajn kruelaĵojn.” Li ridis tra la nazo. Eble la rido ekscitis la vundon, lia vizaĝo paliĝis montrante doloron. “Vi ŝanĝu la urson en la ŝtata butikoj en Xiatun kontraŭ faruno, kaj donu la farunon kaj tiun sakon da mono al la vidvino Zhang.” Je la diro li deprenis de la kokso saketon el hunda ledo kaj ĵetis ĝin sur la tablon.

Klabo prenis la sakon kaj taksis la pezon. “Mi aŭdis, ke vi amindumis ŝin en via juneco...”

Chen ekstaris, kaptis Klaboron je la kolumo, forte tordis lin, kio preskaŭ sufokis lin. Li svingis pugnon antaŭ la nazo de Klabo kaj minacis:

“Se viaj ostoj jukas al vi, miaj pugnoj volontas tikli.”

Li retiris la manon kaj Klabo falis teren.

Morta silento regis en la drinkejo. Ĉiuj gastoj foriris.

Chen residiĝis kaj elverŝis la vinon en la bovlon. “Mi plene plezuriĝis per la vivo,” diris Chen. “Mi ŝuldas al neniuj. Vi notu la sumon por la hodiaŭa drinko; poste iu kvitigos min.”

“Sed kiu? Vi ne havas infanon.”

“Mi havas 42 vundojn. Nun vi vidis novan vundon, ĝi estas oro.”

“Jes, mi komprenas. Mi ne kuraĝas urĝi vin pagi.”

“Tio ne rilatas. Ĉi-foje mi kvitigos min.”

“Ne, ne. Tion mi ne intencas.” Klabo sentis froston leviĝanta supren de la piedoj. Lia tuta korpo tremis kaj liaj dentoj kunfrapiĝis.

Chen demetis oran ringon de sur sia fingro. La ringo surhavis figuron de hundo. La hundo vivis kun li longan tempon. Foje iuj ŝtelis la hundon, buĉis kaj manĝis ĝin. Post tio ili redonis al li la felon de la hundo. En ekstrema doloro kaj kolero li pikis sian gorgon per tranĉilo. Sed li estis savita. Nun li transdonis la ringon al Klabo kaj diris al li: “Memoru, iam estonte vi iru al Liu Santai, donu al li la ringon kaj li pagos al vi komplete.”

Taksante la pezon de la ringo per mano, Klabo subite konsciis ion kaj ekparolis post longa silento:

“Ĉu tiel vi foriros? Ĉu vi ne venos drinki plu en mia drinkejo?”

“Jes, mi foriros sen reveno.”

“Senrevene?”

“Jes.”

“Kien?”

“En la Malgrandan Sugou-valon. Mi devenis de orminejo en la valo, kaj tien mi reiros.”

“Ĉu vi senprudentiĝas? Vi estas vundita... Maksimume en tri tagoj neĝo ŝtopos la trafikon, kaj vi eventuale mortos de frosto dumvoje...”

“Mi mortos de frosto?” Chen Sanjiao ekridis tra la nazo. Li eltrinkis la vinon en la kruĉo, kroĉis la ponardon al sia kokso, surmetis la surtuton el leoparda felo kaj la ĉapon el vulpa felo kaj eliris paŝante kiel urso.

Klabo kuratingis kaj baris Chen, kiu estis malliganta la ĉevalon de la fosto, kaj admonis lin: “Vi ripozu kelke da tagoj ĉe mi por resaniĝo.”

“Ripozi? Ĉu ĉiuj de via loko sciuj, ke mi vundiĝis?”

Chen Sanjiao ĵetis malamikan rigardon al Klabo, jungis la ĉevalon kaj foriris sur la sledo.

Mallumiĝis okcidente. Plumbaj nuboj malalte pendis super la montoj, kaj la arbaro, kvazaŭ grupo da nigraj bestoj, atendis lian sledon.

Tio ja estis okazaĵo antaŭ unu jaro. Tio estis la lasta intervidiĝo de Klabo kaj Chen. Dum la tuta vintro Klabo sentis vantecon kaj malviglecon, kvazaŭ Chen forigus lian penson. Vintro estis ĉefsezono por la drinkejo kaj la mastro povis multe profiti el adulterita vino. Sed neniun informon pri Chen li ricevis kaj la tutan vintron li ermitis hejme, senĉese drinkante. Kiel leporo vintranta en nesto, li multe maldikiĝis. Li sentis sin senutila kiel la nemovebla

drinkejo.

Li ne komprenis, kial Chen decidis forlasi en tiu maniero. Pri lia tuta travivaĵo iuj opiniis, ke li estas bravulo, heroo; aliaj insultis, ke li estas demono, bandito. Sed post kiam li malaperis, ĉiuj senescepte sopiris lin, kaj multe da junuloj konservis al si barbon saman kiel tiu de Chen kaj imite portis veston el leoparda felo kaj ĉapon el vulpa felo. Unuokululo speciale venis al Klabo kaj petis lin transdoni al Chen 5 kilogramojn da bona tabako motivante, ke ankaŭ li iam laboris en orminejo en la Malgranda Sugou-valo.

Post degelo de neĝo venis printempo. Sed por kiu reverdiĝis la herboj?

Multaj homoj de la vilaĝo arope iris en la valon por informiĝi pri Chen, sed neniu sukcesis, kvazaŭ li ne venus en la valon, kvazaŭ li formigrus kune kun la fluo el neĝo degeligita de printempa zefiro.

Ankaŭ Klabo iris tien kun la tabako, bareleto da vino kaj dekoj da kilogramoj da bovaĵo. Revenvoje li iris al la vilaĝo Moling por renkontiĝi kun Liu Santai.

La vilaĝo estis tiel malgranda, ke Liu Santai povis mem eliri, se Klabo vokis lin meze de la vilaĝo.

Sed li neniel povis kredi, ke Liu Santai, kiu staris nun antaŭ li, estis 13-14-jara knabo en vatita jaketo sur la nuda korpo. La vizaĝo, la manoj kaj la brusto en la nebutonumita jaketo estis ruĝaj kiel karto.

“Vi estas Liu Santai?”

“En la vilaĝo ne estas alia Liu Santai. Pro kio vi venis al mi?” senhaste respondis la knabo.

“Ĉu vi konas Chen Sanjiao?”

“Jes.”

“Li lasis min transdoni al vi tiun ĉi ringon.”

“Ĉu li mortis?”

“Mi ne scias. Antaŭ ŝtopiĝo de trafiko pasintjare li iris en la Malgrandan Sugou-valon.”

“Li ne revenos.”

“Kial?”

“Kiam mi estis dek-jara, li diris al mi, ke li iros en la Malgrandan Sugou-valon kaj ne revenos. Li ne volis, ke aliaj vidu lian morton. Ĉu li nenion diris al vi antaŭ la foriro?”



“Li diris nur, ke vi kvitigu lin.”

“Por drinkado? Bone, mi kovros la ŝuldon.”

“Per kio vi kovros la ŝuldon, vi malgranda knabo?”

“Ne hastu. Kiam mi plenkreskos, mi pagos al vi sen manko de unu groŝo. Ĉu vi ne estas Klabo?” Li defie metis la ringon en la manon de Klabo kaj diris: “Vi bone vivu vian vivon kaj atendu min. Tiu ĉi ringo estu garantiaĵo. Vi redonu ĝin al mi, kiam mi kovros al vi la ŝuldon. Mi ne indulgos vin, se vi perdos ĝin!”

Antaŭ ol Klabo elpensis ion por diri, foriris Liu Santai.

Klabo staris surloke kaj remaĉis la vortojn de la knabo. Ju pli li remaĉis, des pli li sentis varmon. La varmo signifas la kvitiĝon. Li kriis al la foriranta knabo:

“Mi ne postulos la kvitiĝon!”

Li ne povis certigi, ĉu la knabo aŭdis. La knabo daŭre iris sen returni la kapon. Klabo klare vidis, ke la knabo portas la bovledan zonon de Chen.

Li longe staris senmove, fikse rigardis la hundon sur la ringo. La larmoj flagris kune kun la ringo en la pala sunlumo. ■

Esperantigis **WANG SHENG**

* La aŭtoro diplomiĝis en 1963 el la Pekina Kemiindustria Kolegio kaj poste laboris en fabriko de agrikulturaj insekticidoj de Pekino. En 1974 li fariĝis redaktoro de la Pekina Eldonejo. Li komencis verki en 1963. Li publikigis sian romanon “Ĉe Meandro Xiangshuiwan” kaj “Elektitajn Novelojn de Zheng Wanlong”. “La Drinkejo ‘Klabo’” estas unu el la kolektitaj noveloj sub la titolo “Kuriozaj Aferoj en Fremdaj Lokoj” publikigitaj en 1985.

Ĉe Taihu-lago

Teksto de ZHANG QINGZHEN
Fotoj de SHEN CHEN

TAIHU-LAGO, unu el la kvin grandaj dolĉakvaj lagoj de Ĉinio, havas areon de 240 000 hektaroj kaj la urboj Wuxi (Uŝji) kaj Suzhou (Suĝoŭ) apud la lago estas famaj vidindejoj. La lago, Granda

Kanalo inter Pekino kaj Hangzhou (Hangĝoŭ), interkruciĝaj riveroj kaj tradiciaj pontoj prezentas pejzaĝon de akvolando sude de Yangzi-rivero.

ĈARMA TAIHU-LAGO

Mi pasigis mian infanecon ĉe la lago. Menciante ĝin, mi tuj ekmemoras la kanton kantitan de mi en

Taihu-lago en nokto

Foto de FENG YUNQING




la infaneco. Ĝi tekstas: “Belas Taihu-lago, kaj ĉarmas ĝia akvo. Sur l’ akvo vidiĝas blankaj veloj, sub l’ akvo kreskas ruĝaj trapoj, ĉe l’ akvo verdas fragmitoj, kaj en l’ akvo naĝas fiŝoj.”



kampanarinoj en la ĉirkaŭurbo de Suzhou

Foto de FENG YUNQING



En lavtuka fabriko de Wuxi-gubernio

Brodistinoj

Foto de YAN JIN



La urbo Wuxi situas norde de la lago. La norda parto de la lago estas la plej bela. Tie la akvo ne estas profunda sed vasta, la montoj ne altaj sed plezurigaj. La lago kaj montoj kunfandiĝas harmonie. Ascendinte la pavilonon Shutian (Ŝutjan), mi ĉirkaŭprenis per rigardo la ĝardenon Liyuan (Liĵuan), pitoreskejon Yuantouzhu (Jüantoŭĝu) kaj la monton Sanshan (Sanŝan).

Lihu estas la interna parto de Taihu-lago. Ĝi estas bela. Inter la interna kaj ekstera partoj de Taihu-lago sidas la monto Zhongdu (Ĝongdu). Inter la montoj Zhongdu kaj Sanshan etendiĝas la vasta ekstera parto de Taihu-lago. Sude de la monto Sanshan imponas la montoj Mashan (Maŝan) kaj Tuoshan (Tuoŝan). Tie la lago fariĝas vastega, kun ondoj kontinuaj, kaj sur ĝi veturas ŝipoj kun blankaj veloj. Kaj pli fore, sur la horizonto, la lago kaj la ĉielo intertuŝiĝas, la nebulo kaj ondoj konturiĝas mistere.

NOVA VOJO AL RIĈECO

La pitoreska pejzaĝo de Wuxi altiras al si grandnombrajn en- kaj eksterlandajn vizitantojn kaj samtempe ĝiaj kamparaj kaj urbataj entreprenoj rapide disvolviĝas, ĉio ĉi pli kaj pli riĉigas la urbanojn.

La industrio de Wuxi havas longan historion. Nun la kamparanoj nuligis la simplan agrikulturan ekonomian sistemon, praktikas multspecan entreprenadon kaj funkciigas kamparajn kaj urbatajn entreprenojn per kolektiva fonduso. En la ĉirkaŭurbo de Wuxi sufiĉe multaj senlaboruloj ricevis okupon, ke iagrade disvolviĝis la industrioj de ŝpinado kaj teksado, elektronikaj aparatoj kaj bicikloj, servo en hotelo, provizo de trinkaĵoj kaj transporto. En Wuxi-gubernio estas 5 000 kamparaj kaj urbataj entreprenoj kaj en la pasinta jaro estis ekspluatitaj 250 specoj de novaj produktoj, kun produktovaloro de 2.8 miliardoj da juanoj.

En 1986 la Fabriko de Elektronikaj Elementoj, fondita en 1976 per kapitalo de 50 000 juanoj, havis la produktovaloron de 8 milionoj da juanoj. Kunlaborante kun la Kvina Radio-aparata Fabriko de Wuxi, tiu ĉi fabriko produktas televidilajn ŝelajojn kaj aliajn pecojn de elektraj aparatoj, kiuj ĝuas altan prestiĝon inter la klientoj. La jara enspezo de ĉiu laboristo en tiu fabriko atingis meznombre 1 500 juanojn. Ne mankas tiaj fabrikoj inter la kamparaj kaj urbataj entreprenoj de Wuxi.

La socia bonstatiga afero de tiu loko estas plibonigita, dank' al la disvolviĝo de la kamparaj kaj urbataj entreprenoj. Plimultiĝis mal-

junulejoj, hospitaloj, infanĝardenoj, lernejoj kaj diversaj kulturaj amuzejoj. Kaj multaj kamparanoj enloĝiĝis en novaj domoj.

LA "SILICIA LAGO" DE WUXI


Ankaŭ rapide disvolviĝis la mikroelektronika industrio de Wuxi en la lastaj jaroj. Nun, la Mikroelektronika Kompanio de Wuxi jam havas la kapablon produkti en la jaro 27 milionojn da pecoj da integraj cirkvitoj kaj en majo 1986 ĝi sukcese elfaris la unuan supergrandskalan integran cirkviton de 64k en Ĉinio. Laŭ ekspertizo, ĉiuj teknikaj parametroj de tiu ĉi silicia peco kun 140 000 elementoj kaj grandeco de duona ungo de la malgranda fingro atingis la avangardan nivelon de la samspecaj produktoj de la mondo. Tio markis, ke la nivelo de la ĉina mikroelektronika tekniko jam atingis novan stacion de la supergrandskala integro.


SUZHOU — URBO KUN MULTAJ ĜARDENOJ

En Ĉinio de antikve cirkulas la proverbo: "La plej bela en la ĉielo estas paradizo kaj en la homa mondo Suzhou kaj Hanzhou (Hangĝou)". Suzhou situas sude de la delto de Yangzi-rivero kaj norde de Taihu-lago. Okcidente de ĝi kuŝas montetaro kaj oriente de ĝi punktiĝas lagetoj. En la loko regas klimato milda kaj agrabla. Influate de kulturo dum pli ol 2 000 jaroj, la urbo abundas je historiaj vidindaĵoj kaj elspiras la antikvan kulturon.

Suzhou distingiĝas per antikvaj ĝardenoj, kies nombro estas la plej granda en la tuta Ĉinio. En la lando estas 4 famaj ĝardenoj. Ili estas la Somera Palaco en Pekino, la Someruma Montvilao en Chengde (Ĉengde) kaj la ĝardenoj Zhuozheng (Ĝuoĝeng) kaj Liuyuan (Liŭyuan) en Suzhou.

La ĝardeno Zhuozheng, kun historio de 450 jaroj, estas la plej granda kaj plej reprezenta en Suzhou. Ĝi kovras areon de 4 hektaroj kaj konsistas el partoj orien-





Sur la Granda Kanalo



Parto de la urbo Wuxi

ta, okcidenta kaj meza. Ĝiaj konstruaĵoj plejparte estas ĉe akvo kaj ornamitaj per pontoj, balustradoj kaj insuletoj. Starante en la ĝardeno, oni ĝuas grandan plezuron.

La ĝardeno Liuyuan havas alian stilon ol la ĝardeno Zhuozheng. Kvankam kompare malgranda, tamen ĝi havas striktan strukturon, elegantecon kaj delikatecon. Arkitekture, aplikante komparojn inter kurbo kaj rekto, alto kaj malalto, helo kaj malhelo, oni lerte dividis la spacon de la tuta ĝardeno en malsamajn grupojn, kio vidigas al vizitantoj diversajn ĉarmajn pejzaĝojn.

La ĝardenoj Zhouzheng kaj Liuyuan havas siajn proprajn karakterizaĵojn. La dispozicio kaj projekto de la ĝardenoj plene montras la trajtojn kaj atingojn de la ĉina klasika arkitekturo.

FAMAJ PRODUKTOJ

La delikataj metiartaĵoj de Suzhou altiras al si eksterlandajn turistojn. La brodaĵo de Suzhou, unu el la kvar famaj brodaĵoj de Ĉinio, estas ĉiutaga necesajo kaj artaĵo. La urbo Suzhou estas laŭdata de antikve kiel "lando de silkaĵoj". Ĝiaj silkaĵoj kiaj gazo, sateno, veluro kaj damasko, estas fajnaj kaj belkoloraj. Ili karakteriziĝas per moleco, dikeco, malpezeco kaj denseco. Song-brokato de Suzhou, Yun-brokato de Nankino kaj Shu-brokato de la provinco Sichuan estas tri famaj brokatoj de Ĉinio.

La tiea tero estas fekunda. Sur ĝi prosperas grenplantoj, legomoj,

ekonomiaj plantoj k.a. Kaj en la riveroj kaj lagoj abundas fiŝoj, salikokoj kaj kraboj. La teo Biluochun (Bilūochūn), mandarinoj kaj aliaj fruktoj produktitaj en la monto Dongting ĉe la lago Taihu ĝuas renomon en Ĉinio. La viandaj kraboj de Yangcheng (Jāngcēng)-lago, kun nigra dorso, blanka abdomeno, orkoloraj ungoj kaj flavaj viloj, estas bongusta plado por festeno sude kaj norde de Yangzi-rivero.

LA DISVOLVIĜO DE LA MALFERMITA EKONOMIO

Dum la vizitado en suda Ĉinio, la disvolviĝo de la malfermita ekonomio profunde impresis min. La urbo Suzhou estis listigita kiel malfermita regiono antaŭ 3 jaroj. Kaj ĝis nun ĝi subskribis 114 kontraktojn por senpere utiligi fremdan kapitalon. La bonkvalito de laborantoj de Suzhou, fleksebla ekonomia organismo kaj fortega konscio pri merkato kaj konkurenco de entreprenistoj estas konformaj al situacio de internacia merkato. Nombro da bonkvalitaj produktoj de Suzhou jam havas lokon en la internacia merkato.

Mi vizitis ankaŭ Kunshan (Kunŝan), novtipan industriaran regionon en la ĉirkaŭurbo de Suzhou. Ĝia ekspluato komenciĝis en 1985. Post tri jaroj tiu regiono havas certan skalon. En la regiono kun areo de 3.75 kvadrataj kilometroj, vojoj kondukas al ĉiuj direktoj, sufiĉas provizo de akvo kaj elektro kaj oportunas telekomunikado, kio altiris al si 17 entreprenojn.

Kvin el ili estas investitaj kune de Ĉinio kaj aliaj landoj. En 1987, 13 entreprenoj en la regiono komencis produktadon.

La Ĉina-Sony-a Limigita Kompanio la unua fondis entreprenon en tiu loko. Siatempe, la ĝenerala direktoro de la Japana Sony-a Korporacio venis al Ĉinio por fari esploradon. Li vizitis 6 lokojn en la delto de Yangzi-rivero. Post esplorado li trovis, ke Kunshan havas geografian superecon kaj posedas necesajn kondiĉojn de servado, kaj senhezite decidis fondi en Kunshan la Ĉina-Sony-an Limigitan Kompanion en kuna investado. En tri jaroj la kompanio produktis tri milionojn da paroj da poreksportaj bovledaj gantoj. La ĝenerala direktoro de la kompanio diris: "Nia korporacio estas tre kontenta pri la investa medio kaj preta fondi samskalan entreprenon per sia propra mono."

En la lastaj jaroj pli ol 1 000 alilandaj entreprenoj investis en la regiono sude de Yangzi-rivero, kio sendube akcelis la ekonomian disvolviĝon de la loko. Samtempe kun tio, aperis iuj problemoj en la konstruado de la regiono, ekz., nekonvena sistemo, multkanalaj rilatoj kun aliaj landoj kaj troa malsimpleco de sankcia proceduro. Kiel diris Hu Zhiming (Hu Ĝiming), direktisto de la nomita kompanio, la disvolviĝo de la malfermita ekonomio devas iri longan vojon. En ĝi ĉiam ekzistas defio kaj ŝanco, premforto kaj movforto, malfacilo kaj espero, risko kaj profito, tamen ni neniel devas heziti. En la lastaj 3 jaroj, kvankam la vojo estis malfacila, tamen ni ja akiris certan sukceson. ■



Zhuozheng-ĝardeno en pluvo

Foto de YAN JIN

Kampanaraj domoj en akvolando



Taihemen-pordego kaj Taihemen-placo

Teksto de MU YI
Fotoj de YAN JIN

TRAIRINTE la mezan irejon de la pordego Wumen destinitan ĉefe por la imperiestroj, oni vidas la vastan placon Taihemen kun areo de 26 000 kvadrataj metroj. Anbaŭflanke de la placo staras po vico da ruĝaj ĉambroj. La arka Interna Jinshui-rivero transverse trafluas la placon, kaj kvin pontoj el blanka marmoro kondukas al la ore brila Taihemen-pordego.

Taihemen-pordego, tre grava konstruaĵo en la Imperiestra Palaco, estis konstruita en la 18-a jaro (1420) de la regperiodo Yongle de Ming-dinastio.

La pordego sidas sur la akso de la Imperiestra Palaco, kaj estas etendaĵo de la ekstera korto de la palaco. Pro la grava situo ĝi estis konstruita sub plena zorgo. La pordego, fronte al la sudo, havas pluraleran tegmenton el flavaj glazuritaj tegoloj. La 23.8 metrojn alta pordego estas la plej alta kaj plej impona el la pordoj en la Imperiestra Palaco. Antaŭ la pordego sterniĝas vasta teraso sur bazamento limigita de parapeto firmigita per balustroj el blanka marmoro. Meze de la ŝtuparo inkrustiĝas giganta ŝtona bloko kun bareliefaj drakoj. La traboj, kolonoj kaj plafono de la irejo de la pordego estas lukse desegnitaj. Sur la ŝtuparo staras kvar antikvaj bronzaĵoj (kuiriloj). En la dinastioj Ming kaj Qing, brulis en la dingoj santalligno. La ŝvebanta fumo kaj la honora gvardio faris la atmosferon pli solena. Malsupre de la ŝtuparo antaŭ la pordego staras paro da bronzaĵoj leonoj. Ŝtonaj kaj bronzaĵoj leonoj estis altklasaj ornamaĵoj por luksaj domoj en la antikveco de Ĉinio. En la Imperiestra Palaco estas 6 paro da bronzaĵoj leonoj, kaj la paro antaŭ Taihemen-pordego estas plej granda. La leono dekstre de la pordo estas insekca, karesanta leonidon per sia maldekstra piedo. Tiu maldekstre de la pordo estas virseksa distriĝanta per pilko sub la dekstra piedo.


Nun en la pordega enirejo estas nenia ornamaĵo. Sed en Ming-dinastio tie estis trono de imperiestroj, post ĝi kvarpeca orumita ekrano kun reliefaĵoj drakoj, kaj inter la trono kaj ekrano staris du grandegaj

ventumiloj el orflava silko. Ĉiumatene antaŭ krepusko, la korteganoj kolektiĝis ĉe la pordo por atendi imperiestron. Post saluto de la korteganoj la imperiestro komencis decidi ŝtatajn aferojn. "Luno subironta en nebulo pendas alte sur la ĉielvolbo, miloj da lampoj iluminis la palacan pordon." La versoj el la mezo de la 15-a jarcento registris la matenan kunvenon de korteganoj. Kvankam estis malhele antaŭ la tagiĝo, tamen en kaj ekster Taihemen-pordego estis brila lumino kaj granda

Bronza leono antaŭ la pordego



PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-roj 2 kaj 3 en la plano signas la placon kaj pordegon.

homamaso. Kiam la korteganoj estis revenantaj hejmen post la kunveno ĉe la imperiestro, la steloj ankoraŭ brilis sur la ĉielo. Dum la matena kunveno la loko estis rigore gardata. Tiam la militaj korteganoj staris oriente de la pordo, kaj la aliaj korteganoj maldekstre. Prinoj kaj dukoj staris plej fronte, kaj post ili staris laŭvice bofiloj de imperiestro, grafoj kaj korteganoj sub la unua klaso. Kiu volis ion raporti al la imperiestro, tiu devis iri unue al la fino de la vico kaj de tie iri antaŭen; estis malpermesite por li iri transverse el la vicoj. Post raporto tiu devis reiri al sia loko. Se iu rigardis ĉirkaŭen dum la kunveno, li estis insultita kaj punita. Tia matena kunveno estis ofta en la unua periodo de Ming-dinastio, sed poste tia kunveno okazis pli kaj pli malofte. En la lastaj jaroj de la dinastio la imperiestro malofte kunvokis la korteganojn, kaj pro tio korteganoj ofte forgesis la datojn de la matena kunveno, kaj kelkfoje ili kverelis pro misokupo de alies loko.

En Qing-dinastio la matena kunveno okazis ĉe Qianqing-pordo en la interna korto, sed tamen la imperiestroj ofte akceptis gratulantojn ĉe Taihemen-pordego. En 1644 kiam la imperiestro Aixinjueluo

Fulin transloĝiĝis en la Imperiestran Palacon, li akceptis gratulantojn, donis festenon kaj dekretis amnestion ĉe Taihemen-pordego.

En la komenco de Qing-dinastio imperiestro ofte ekzamenis korteganojn ĉe Taihemen-pordego. En 1645, imperiestro Fulin improvizis ekzamenon al la korteganoj. Li alvokis laŭvice 62 korteganojn kaj demandis ilin pri la ŝtataj aferoj. 20 el la ekzamenitoj falis en konsterniĝon kaj estis insultitaj de la imperiestro. En 1650 la imperiestro refoje improvizis teston al kortegaj literaturistoj. Pro malsukceso pli ol 10 el ili estis degradigitaj.

Taihemen-pordego estis ankaŭ la loko kie imperiestroj ŝanĝis trafikilon. Kiam la imperiestroj intencis fari vojaĝon aŭ inspektion, ili venis unue al la pordego per palankeno, kaj tie ŝanĝis tiun per ĉaro. Tie la imperiestroj akceptis ankaŭ delegitojn de aliaj landoj kaj vasaloj.

En la dinastioj Ming kaj Qing la pordego estis plurfoje trafita de brulego kaj la plej serioza brulego okazis en 1888. Tiufoje unue brulis la flanka pordo Zhendumen dekstre de Taihemen-pordego. Poste la brulego involvis Taihemen kaj la flankan pordon Zhaodemen maldekstre de la pordego. Krom la tri skaloj da ŝtupoj kaj la bronza leono, nenio restis el la incendio. La incendio okazis unu monaton antaŭ la edziĝo de la imperiestro Guangxu, kio estis rigardata kiel malbona aŭguro. La tempo ne sufiĉis por restitui, kaj oni povis nur starigi provizoran pordegon el traboj kaj koloraj silkoj, similan al la originalo. La nuna Taihemen-pordego estis rekonstruita en 1889.

La flankaj domoj oriente kaj okcidente de la placo Taihemen havas po pordon en sia mezo. La orienta estas Xiehemen-pordo, kaj la okcidente — Xihemen-pordo. Ili estas la nepraj trairejoj de la plalaco al la pordoj Donghuamen kaj Xihuamen, kaj ankaŭ gravaj interligaĵoj por la meza vojo de la ekstera korto kaj la du aloj. Ili estas nemalhavebla parto de la korto.

En la komenco de Ming-dinastio Xiehemen-pordo estis nomata Zuoshunmen-pordo. Ĝi havas jam 400 jarojn kaj portas la arkitekturan stilon de Ming-dinastio. En la regperiodo Jingtai (1450-1457) de Ming-dinastio la imperiestro okazigis tie tagmezan kunvenon de korteganoj. La domoj ambaŭflanke de la pordego estis oficejo de la kabineto. La kabineto en la dinastioj Ming kaj Qing estis helpa institucio por la imperiestroj en traktado de ŝtataj aferoj. En la komenco de Ming-dinastio la pordo Xihemen estis nomata Youshunmen-pordo. La nuna pordo estis rekonstruita antaŭ 200 jaroj. Ĉambroj ambaŭflanke de la pordo estis tradukejo, registrejo kaj nutraĵtenejo. Ĉe la komenco de Qing-dinastio plejparto de la manĉuroj ne konis la hanan lingvon, tial la imper-




Xihemen-pordo kaj domoj ambaŭflanke


Kolore desegnitaj traboj, kolonoj kaj plafono de Taihemen-pordego

iestro kunvokis manĉurojn bone sciantajn la hanan lingvon por establi tradukejon kaj traduki famajn hanlingvajjn librojn en la manĉuan lingvon. Poste la tradukejo zorgis pri traduko de dekretoj kaj paroloj de imperiestroj kaj dokumentoj. La registrejo notis la parolojn kaj agojn de la imperiestroj. Ĉiumonate oni metis la dosierojn en ŝrankon kaj en jarfino transdonis al la kabineto. La nutraĵtenejo konservis tributitajn mangaĵojn tre diversajn kaj grandkvantajn, sufiĉajn por dekoj da jaroj por la uzo de la imperiestra familio.

En la suda parto de la placo antaŭ Taihemen-pordo trafluas la Interna Jinshui-rivero. La rivero estas distingiga elpensajo por la strukturo de la Imperiestra Palaco. La rivero fluas jen larĝe, jen mallarĝe, jen surtere, jen subtere. La riverparto en la placo estas pli larĝa ĉe la mezo, formante lunar-kan surfacon. La plej granda larĝo estas 10.4 metroj. Ambaŭborde de la rivero staras balustradoj el blanka marmoro. Simila al jada rubando, la rivero faris la placon pli ĉarma. Super la rivero kuŝas kvin pontoj el blanka marmoro. La meza ponto, la plej larĝa kaj plej longa, estis destinita por imperiestroj. La korteganoj rajtis iri nur sur la aliaj kvar pontoj. La kvin arkaj pontoj kaj rivero ornamita per balustrado teksis admirindan pentraĵon. Kvankam la placo estas tre vasta kaj de tie oni povas iri al multaj vidindejoj, tamen la turistoj unuafoje venintaj al la loko ofte estis altiritaj al la pontoj. Tiu arta efiko enkorpigis estetikan principon, kaj estis kristaliĝo de la saĝo de la arkitektoj en la antikva Ĉinio. ■







Panorama vido de Taihemen-placo

Kato de TRUDE SINNO (FR Germanio)

